



*Albana Esperanto-Asocio estas jure agnoskita laŭ decido nr 3503
dato 15/02/2013 de la Juĝejo de Tirana*

*Shoqata Esperantiste Shqiptare është e njohur ligjërish sipas
vendimit nr 3503 datë 15/02/2013 të Gjykatës së Tiranës*

Retpaĝo- Faqja në internet: <http://esperantoshqipria.weebly.com/index.html> aŭ www.esperanto.net/al

Diskutlisto- lista e diskutimit në internet: albanajesperantistoj@yahoo.com

BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO - INSTITUTO

Buletini i Institutit Shqiptar të Esperantos

Nr. 121, oktobro- tetor 2015

Niaj proverboj- Proverbat tona

La albano, promesinte la parolon, pretas eĉ sian filon buĉi. (Sudo)- Pasi ka dhënë besën, shqiptari është gati ta therë edhe djalin (jug)

La hejmo de albano estas ja hejmo de amiko kaj de migranto (Nordo)- Shtëpia e shqiptarit është e mikut dhe e shtegtarit (Veri)

La albano pretas sin senkapigi sed la donitan parolon ne rompu (Nord)- Shqiptari është gati ta heqë kryet por të mos e thyejë besën (Veri)

La albano ne lasas sin malvenĝi kaj la ŝuldon senkvitigi. (Nordo)- Shqiptari nuk rri pa u hakmarrë dhe borxh pa larë (Veri)

Frumatene la pordon malfermu ĉar la hejmo pleniĝas je sorto (Shkodër)- Hape derën herët në mëngjes sepse shtëpia mbushet me fat (Shkodër)

Oni ne laŭdas la floron sed la abelon por la mielo (Laberia)- Nuk lavdërohet lulja por bleta për mjaltin

Ni kaj UEA, ILEI kaj AIS

Martha Otto- raporto pri UK Lille

Johan Derks Aperis la numero 2015-3 (septembro) de Balkana Verda Stelo, altnivela periodaĵo kun kvardek paĝoj,

AMO en 2016

Andy Kuenzli Kongresa Analizo

Niaj membroj- Zamir Gjurgji

NOVAJ LIBROJ EN LA SCIENCA KAJ TEKNIKA ESPERANTO-BIBLIOTEKO

REZULTO DE ENKETO - PRI KULTURAJ EO

UEA sekvu UEFA

Anoncoj kaj Informaĵoj

Ekspozicio

52aj Balta Renkontiĝo

Fervojista kongreso en Varna- Bulgario

José Provetti

Cyrille Hurstel

Nia propagando

Esperanto en bildoj

Reklamknabino

100. 000 REGISTRIGOJ POR LA ESPERANTO-KURSO ĈE DUOLINGO

Niaj leteroj

El Ĉehio, Brazilo, Hungario, Italio, Svisio, Brazilo, Afriko ka

Artikoloj

Fatbardha Demi Pri la origino de la nomo SHQIPETAR, unua parto

Manifestacio en Japanio

Jose Paivo- Ne plu emerituloj

La situacio en Hungario rilate la krizon de la rifuĝintoj

Beletraĵoj

Mimoza Ahmeti- poezioj

Poeziaĵo de Elzbieta (Pollando)

Sigmond Julia LETEROJ 2015

Ni kaj UEA. ILEI kaj AIS

Martha Otto

La vere impona 100a Universala Kongreso en Lillo, Francio

Imagu 2700 homoj el 80 landoj en unu loko parolante chiuj la saman lingvon! Kie do povus okazi tia fenomeno en nia dividita, interbatalanta mondo? Nur en Esperantujo kompreneble! Jes, fine de julio 2015 tiu vere mirinda fakto spertebliis en Francio, kie ankau okazis la unua kongreso en 1905 en la apuda urbo de Boulogne-sur-mer. Pro tio, dum la ekskursita tago, centoj da Esperantistoj tien vojaghis buse au aute por partopreni la solenajhojn organizitajn far la urbestro, Sro Frederic Cuvillier (en blanka chemizo). Unue ni kunvenis antau la iama kongresejo, poste amaso da Esperantistoj marshadis tra la urbo kun Esperanto-flagoj kaj kantoj al la stacidomo, kie, en 1905, alvenis L. L. Zamenhof kun aliaj kongresanoj, kaj memorbusto estis inaugurita. Tre honora kongresano akompanis nin: Sro. L. Zaleski Zamenhof, 90-jara nepo de L. L.

Zamenhof. Poste, la urbestro akceptis specialajn gastojn kaj Esperantistojn - tiuj, kiuj sukcesis eniri la urbodomon! - kun varmaj vortoj, informinte nin ke la municipo intencas restauri malnovan vilaon kaj nomi ĝin Vilao Espero. Granda Aplaudoj!

Krom la kutime riĉega UK-programo la francaj amikoj sukcese organizis lingvo-kursojn por gastoj. Partoprenis dudeko da amikoj el la Bahaa Esperanto-Ligo el 9 landoj (sur la foto: el Ĉinio, Islando, Francio, Albanio, Germanio) kaj ni ĉiuj ĝuis la interesriĉajn konversaciojn kun kongresanoj kaj vizitantoj.

Estis neforgesebla evento, kiu ripeteblos kiam?

Heide Martha Otto, Vlora, Albanio





Aperis la numero 2015-3 (septembro) de Balkana Verda Stelo,

altnivela periodaĵo kun kvardek paĝoj,

el kiuj 22 traktas aŭ fotas la dramon de eŭropaj migrantoj kaj rifuĝintoj.

Kiel la sudorienteŭropaj landoj "solvas" la problemon? Kion diras la homaj rajtoj, Kion preskribas la *Konvencio pri la statuso de rifuĝintoj kaj senpatrujuloj* ?

Serioza demando altrudiĝas:

Ĉu la esperantistaro kuraĝas meti la fenomenon de malamikeco al fremduloj ĉe la landlimo, pro timo perdi propran identecon, en sian tagordon?

Ĉu ĝi entute interesiĝas pri la neceso ekkomuniki translime, Hungarujo kun Serbujo kun Makedonujo, Makedonujo kun Grekujo, Kroatujo kun Serbujo kun Albanujo, Rumanujo kun Bulgarujo kun Turkujo, ne nur la politikistoj, sed la esperantistoj mem, ĉar nun dividitaj en apartaj landaj asocioj, pasive. La lokoj estas konataj: Szeged, Nagyfa, Preševo, Ásotthalom, Tabanovce (Kumanovo), Horgoš (Kanjiža), Gevgelija, Evzonoj kaj inter Kapetano Andreevo kaj Lesovo, la insuloj Kos, Lesbo kaj Leros, por ne paroli pri la italaj havenoj kaj Calais.

Ni estas movado por lingvaj rajtoj, diras la Manifesto de Prago. Mi diras: Ni estas movado por homaj rajtoj, por helpi establi "internacian protektadon" (art. 14 de la Homaj Rajtoj).

Legu la enkondukon al la problemoj, kiu ankoraŭ longe hantus Eŭropon, kun konsciigaj fotoj en "Balkana Verda Stelo".

Aldone vi ĝuu la literaturan kaj movadan parton de BVS.

La pdf-dokumento estas elŝutebla **en difektita, do protektita formo** hiperligile per <https://drive.google.com/file/d/0B73gFFtlyHmETVdJZGlaclhrMHc/view?usp=sharing>.

Mendoj kontraŭ po € 5, = al la konto bvst-n de UEA (NL72 INGB 0000 3789 64), por jarkolekto 2015-2016 (kvar numeroj) € 16, =.

Bonvole komplete skribu vian adreson.

Rabato por pluraj abonoj samtempe. Petu tarifon de mesaĝanto.

Mi financas la revuon dum la unuaj du jaroj. Post tio mi retiriĝos.

Esperantistoj el la tuta mondo komprenu la gravecon subteni la agoniantan balkanajn movadojn per abono.

AMO pluiras eĉ pli intense al 2016





Post intensa laboro kaj planado ni fiere anoncas la maturiĝon de la programo de UEA pri Aktivula Maturigo (AMO) lanĉita en 2013. En la septembra numero de revuo *Esperanto* (p 173) kaj en EKO 39 ni anoncis al vi pri la 15a seminario en Greziljono fine de oktobro kun temo 'Grimpi la monton granitan' kaj gvidanto Stefan MacGill. La gvidantaro por AMO 16 en Havano novembre fariĝis pli internacia.

Se AMO estus homo, 15- aŭ 16-jaraĝulo ankoraŭ adoleskas. Sube vi legos pri planoj ĝis 20. Do, AMO definitive iĝos ene de duonjaro plenkreska.

AMO 17: Eger, Hungario, 28-31 dec. 2015, kadre de JES (Junulara Esperanto-Semajno, mem de la 27a de dec. ĝis la 3a de jan.) Pozitivismo regos; ene de la temo 'Junigi la komunumon' ni celas konigi sukceskialojn en iuj landoj (HU, PL, UA...) al junuloj kaj junulgvidantoj el la Sud-Orienta Regiono Eŭropa (SORE). Ni aŭdos pri la situacio en landoj de tiu regiono. UEA asignos stipendiojn por indaj seminarianoj al homoj el tiu nesufiĉe atentata regiono de la kontinento. Pri la temo, vidu revuon *Esperanto* (nov.). Informoj: jes.pej.pl.

AMO 18: Závažná Poruba, Slovakio, 6-10 jan., kadre de la 34a POLUDNICA 2016 kies temo estas 'Renkontiĝo de E-vojaĝantoj'. Jen nova temo por AMO: 'Kiel organizi E-vojaĝojn kaj turismajn ekskursojn', konvena al la Tatro-montara okazigejo, turisma vilaĝo 4 km de Liptovský Mikuláš. Gvidantoj kaj temoj:

- J. Vajs (SK): Diferencoj inter vojaĝoj organizitaj de vojaĝoficejoj kaj de esperantistoj
- D. Rodzianko (PL): Kiel vojaĝi malmultekoste
- M. Blahuš (CZ): Geografiaj konkursoj dum renkontiĝoj de E-vojaĝantoj kaj turistoj
- V. Radovanoviĉ (HR): Multjaraj spertoj kun organizado de regulaj turismaj renkontiĝoj
- Zdechlik (PL): Organizado de E-vojaĝoj al malproksimaj landoj
- P. Chrdle (CZ): Avantaĝoj kaj malavantaĝoj de E-vojaĝoj

La seminario okazos memore al Andreo Grzębowski – ja en aprilo 2015 ni planis kun li fari tian AMO-seminaron en Bydgoszcz. Informoj: www.poludnica.esperanto.sk

AMO 19: Manaus, Brazilo, kadre de la 51a Brazila Kongreso de Esperanto kaj 36-a Brazila Esperantista Junulara Kongreso de la 22a ĝis la 26a de jan. 2016. AMO eniras Amazonion. Temo: 'Esperanto: komunikilo por daŭripova mondo'. Gvidantoj: Fernando Maia Jr., Lucas Barbosa, Alvaro Motta.

Informoj: <http://esperanto.org.br/info/index.php/pages/kongresoj>

AMO 20: Katmanduo, Nepalo, 27-29 feb., kadre de la Dua Speciala Ekskurso 2016 feb. 26- mar. 8. Inter la gvidantoj: Hori Jasuo (Japanio), Trezoro (Ĉinio), Bharat Ghimire (Nepalo). Informoj: nespa.1990@gmail.com

La estraro de UEA nomumis novan administranton por AMO: d-rinon Sara Spanò, kiu formos teamon da helpantoj. Ŝi kunlaboras kun la nuna administranto inter nun kaj AMO 21; ekde AMO 22 ŝi prenos la ĉefan respondecon, kunlabore kun la ĝisnuna administranto dum transira periodo.

Eretoj

- **La protokolo de la komitata kunveno** en Lillo estas nun legebla ĉe <http://www.uea.org/teko/komitato>. Ni dankas la protokolantojn Pavel Fischer-Kotowski kaj Osmo Buller pro ilia efika laboro.
- **Metodika trejnado en Germanio:** de la 30a sept. ĝis la 4a okt. okazos TORPEDO 10 en Herzberg am Harz. Temas pri 5-taga specialeminario, metodika trejnado por nunaj kaj estontaj instruistoj kaj kursestroj, kiu ankaŭ ĉi-jare havos internacian partoprenantaron. Detaloj sekvas baldaŭ en EKO 43.
- **Publikaj prelegoj per skajpo - en la Tago de Lingvoj:** La informejo *Ret-Info* informas, ke portalo edukado.net organizas skajpajn prelegojn sabaton la 26-an de sept. kaj la 28-an. Ĝis nun oni havas sep kontribuojn pri la lingvoj: itala, franca, ĉina, vjetnama, islanda, la usona signolingvo kaj la okcitanaj. Prelegos: Renato Corsetti, Sylvain Lelarge, Xueqin SHI (Neĝeta), Nguyen Xuan Thu, Nicola Ruggiero, Lee Miller kaj Christophe Chazarein. Vidu <http://edukado.net/novajhoj?id=570>. Detaloj sekvas baldaŭ en EKO 43.

Andy Kuenzli

Kongresa analizo:

LA FRANCA KONGRESO

Kiuj partoprenis kaj kiuj ne partoprenis en la 100a Universala Kongreso de Esperanto Ankaŭ el la vidpunkto de la landa statistiko la kongreso estis nura blufio

Laŭ la Kongresa Rezolucio de la 100a Universala Kongreso de Esperanto okazinta en julio en Lille (Francio) aliĝis entute **2695 personoj el 80 landoj**. 1 En la ĉi-koncerna indekso publikigita en la retujo de Universala Esperanto-Asocio² estas indikitaj la ciferoj 2570 aliĝintoj el 81 landoj. Mi intence uzos ĉi tie la vorton *aliĝi/nt/o/j* kaj bazos la raporton sur la ciferoj de aliĝoj, ĉar (krom UEA, kiu kaŝos tiun informon kvazaŭ kiel ŝtatan sekreton) verŝajne neniu povas scii kiom da homoj reale partoprenis.

1 Vd. <http://www.uea.org/gk/584a1>. En la teksto de la rezolucio, kiu estis rete dissendita de UEA la 4an de aŭgusto, estis indikita la cifero de 82 landoj.

2 Vd. http://uea.org/kongresoj/alighintoj_laulande, kie ĝis la tago de la publikigo de ĉi tiu raporto (8. 8.) estis registritaj 2570 personoj el 82 landoj.

3 Kiu publikigis kompletigon de aliĝintoj laŭ n-roj 2485-2689. Ŝajnas, ke grandparto de la aliĝintoj aperintaj inter la kongresaj numeroj 2571 kaj 2689, kiuj estis aldone publikigitaj en la Kongresa Kuriero *Belfrido*, jam estas integritaj en la indekso de la retujo de UEA, do aperas iu stranga diferenco inter ciferoj 2695 (Kongresa rezolucio) kaj 2689 (Kongresa Kuriero) unuflanke kaj indekso en la retujo de UEA (2570) aliflanke.

4 En Boulogne-sur-Mer UEA havas 1 kaj en Lille 2 delegitojn.

Per tio tiu lilla kongreso estis kvante la plej granda depost Berlino (1999), al kiu aliĝis 2712 personoj. En la antaŭa jaro, en Montpeliero, aliĝis ankoraŭ 3133 personoj. Poste la nombro de aliĝintoj draste falis kaj ŝanceliĝis laŭ jena evoluo: Tel-Avivo (1212), Zagrebo (1691), Fortalezo (1484), Gotenburgo (1791), Pekino (2031), Vilno (2344), Florenco (2209),

Jokohamo (1901), Roterdamo (1845), Bjalistoko (1860), Havano (1002), Kopenhago (1458), Hanojo (866), Rejkjaviko (1034) kaj Bonaero (706).

La ĉefa konkludo, komento aŭ konstato, kiun oni povas fari koncerne la nombron de aliĝintoj de la lilla kongreso, estas ke tiu nombro ne estas malbona, sed okaze de la 100-jara jubileo oni estus povinta atendi kaj eble atendis pli altan nombron de aliĝantoj kaj partoprenantoj.

La nombroj de la UK en Varsovio '59 (3256), Sofio '63 (3472), Budapeŝto '66 (3975), Varno '78 (4414), Budapeŝto '83 (4834), Varsovio '87 (5946) kaj post tio en Vieno '92 (3033), Prago '96 (2972) kaj Montpeliero '98 (3133) do neniam plu povis esti atingitaj.

Kie do estis kaj estas la „milionoj“ da esperantistoj, pri kies laŭdira aŭ ŝajna ekzisto certaj propagandistoj konstante palavras, blufas kaj fanfaronas?

La tasko de ĉi tiu raporto estas analizi la ciferojn laŭ landa deveno de aliĝintoj en Lillo. La ciferojn kaj indikojn pri deveno de la aliĝintoj eblas trovi krom en la tradicia Kongreslibro kaj Kongresa Kuriero³ ankaŭ en la koncernaj paĝoj de la retujo de Universala Esperanto-Asocio. Rapida superrigarda analizo de la situacio de la landa kaj geografia deveno de la aliĝinta kongresanaro donas sekvantan bildon.

Koncerne la devenon de la aliĝintaro de la ĉi-jara Universala Kongreso en Lillo (2015) oni povas konstati jenajn faktojn:

Unue estu analizata la stato de aliĝoj el *Okcidenta Eŭropo*:

Laŭ la indekso de la retujo de UEA pri kongresaj aliĝintoj, 687 aliĝintoj devenis el *Francio*.

En la Kongresa Kuriero *Belfrido*, kiu publikigis kompletigan liston de aliĝoj, inter la kongresaj numeroj 2571 kaj 2689 aperis ankoraŭ 87 francoj, sed ŝajnas ke grandparto de tiuj aliĝoj jam estas parto de la indekso de la retujo de UEA, kiel (unuopa) kontrolo de nomoj evidentigis (kelkaj nomoj mankis). Do, oni povas paroli pri almenaŭ 700 aliĝoj el Francio, kio estas 26 procentoj de la tuta kongresanaro, kio signifas, ke pli ol unu kvarono de la kongresanaro en Lille estis francoj. Se aliĝis nur 2570 personoj, ĉe 700 francoj la procentaĵo estus 27%. Dum tiuj homoj venis el plej diversaj regionoj de Francio, el la urbo Lille mem aliĝis 7 kaj el Boulogne-sur-Mer mem, loko de la unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905, 2 personoj. Eble ekzistas ankoraŭ kelkaj esperantistoj en la koncernaj departementoj kaj regionoj, sed tiuj malaltaj ciferoj indikas, ke la Esperanto-movado en tiuj urboj kaj regionoj devas esti malforta. 4

Nun ni rigardu la ciferojn de aliaj okcident-eŭropaj landoj. 2

El *Germanio* aliĝis 193 personoj. Inter ili troviĝas multaj geedzoj kaj familioj. Rapida trarigardo montras, ke la plimulto venis el okcidenta Germanio, dum 10-20 personoj venis el orienta Germanio (iama GDR), ĉefe Dresdeno, Lepsiko, Cottbus, Pirna kaj probable orienta Berlino. Ŝajnas ke la mil-dumil esperantistoj, pri kiuj GDREA siatempe fanfaronis, grandparte elvaporigis.

Aŭstrion konsistigas tradicie malgranda grupo; ĉifoje estis nur 17 aliĝintoj, inter kiuj troviĝis unu kvarpersona familio.

La delegacio el *Svislando* ampleksis 47 personojn, de kiuj la plimulto loĝas en la franclingva parto.

El *Nederlando* aliĝis 77 personoj, inter kiuj parto estis oficistoj de la CO de UEA. El najbara *Belgio* aliĝis 90 personoj, ĉefe el Flandrio. *Luksemburgio* estas iom speciala kazo, ĉar de tiu lando devenas krom la kvar-membra hungar-franca familio Ertl kaj la paro Moon (anglo)-Nourmont (francino) nur tri aliaj esperantistoj, inter kiuj unu estas belgo laboranta en Luksemburgo. Ĉu tiuj personoj posedas la luksemburgan ŝtatanecon, ne estas konate.

Nun ni turnu la atenton al Britio, Irlando kaj Norda Eŭropo (Skandinavio): El *Britio* venis 58 kaj el *Irlando* 2 aliĝoj.

Danlando sendis 43, *Finnlando* 41, *Svedio* 37, *Norvegio* 22, *Islando* 5 aliĝintojn, inter kiuj troviĝas unu italo.

En la sekvo ni nombru la aliĝintojn el sudeŭropaj landoj: El *Italio* aliĝis 85, el *Hispano* 51 (nur malmultaj venis el *Katalunio*, iama Esperanto-„bastiono“), el *Portugalio* 7 personoj. Aliĝintaj grekoj estis 2. El *Kipro* ekzistis 1 aliĝinto.

Kaj nun interesas nin *Orienta Eŭropo*, kie siatempe la Esperanto-movado „furoris“, sed intertempe ŝrumpis al kerna, pli malpli neglektebla minimumo.

El la iamaj Esperanto-„bastionoj“ Pollando, Hungario kaj Bulgario, kies landaj asocioj havis ĝis la kolapso de la komunismo (dek)milojn da kolektivaj membroj, kun 109 aliĝintoj la grupo el *Pollando* estis relative granda (Var-sovio 17, Bjalistoko 12, Nowy Sącz 10, Poznań 3!), tiu el *Hungario* kun 40 personoj (unu 4-persona familio el Mosonmagyaróvár) estis malgranda kaj tiu el *Bulgario* kun nur 16 aliĝintoj estis mikra.

El *Ĉeĥio* aliĝis 49 kaj el *Slovakio* 26 personoj (la ĉi-lastata nombro estas atentinda vide al la UK 2016 okazonta en Slovakio; el Nitra estis unusola aliĝo).

Nun ni rigardu la nombrojn de aliĝintoj el la respublikoj de iama *Jugoslavio*:

Slovenio 1 (eĉ ne sloveno), *Kroatio* 8, *Serbio* 2, *Bosnio-Hercegovino* 1 (honora membro Simo Milojević!, sed ĉu li ankaŭ vere partoprenis? – kie estis la homoj de IJK Sarajevo 2006?).

Rumanianoj aliĝis 12, *Albanio* registris 1 aliĝinton, sed ne temas pri albano, do neniu albano aliĝis.

El la Baltaj Ŝtatoj aliĝis: *Litovio* 35, *Latvio* 11, *Estonio* 6.

El *Ruslando* aliĝis 49 homoj (Moskvo 15, SPB 3, Kaliningrad 1, resto el eŭropa kaj azia Ruslando).

El *Ukrainio* aliĝis 12 personoj (Kievo 6), el *Belorusio* 2, *Armenio* 3, *Kartvelio* 3 kaj el *Kazaĥstano* 2 personoj.

Ĉu esperantistoj el orienta Eŭropo tro malabunde aliĝis, ĉar ili estas malriĉaj kaj ne havas monon? Povas esti, kvankam tiu klarigo estas certe tro simpla, des pli ke la limoj estas malfermataj kaj ĉiu individuo rajtas vojaĝi eksterlanden (vojaĝi mem estas relative malmultekoste, sed la restadkostoj en eksterlando ja estas altaj, kaj ĉu la kotizo de UK estas tro alta, pri tio oni povas diskuti, se kompari kotizojn kun aliaj kongresoj, kiuj ofte estas multe pli altaj). Ankaŭ dum la komunismaj tempoj orienteŭropaj esperantistoj estis malriĉaj kaj ne havis

sufiĉe da mono, sed ili tamen klopodis vojaĝi, malgraŭ la fermataj llimoj. Do, la vero estas, ke en tiu landaro ekzistas tro malmultaj esperantistoj!

Nun pri Azio: Kun 166, 87 kaj 55, do kun entute 308 aliĝintoj la landogrupo *Japanio*, *PR Ĉinio* kaj *Korea Respubliko (suda Koreio)* formis la plej grandan grupon de aliĝintoj el orienta Azio.

Unuopaj azianoj aliĝis el *Irano* 28, *Israelo* 18, *Vjetnamio* 10, *Nepalo* 8, *Mongolio* 7, *Tajvano* 6, *Pakistano* 5, *Indonezio* 3 (Indonezio estis akceptita kiel nova Landa Asocio de UEA), *Orienta Timoro* 3, *Hinda Unio* 2 (Dasgupta, Rao), *Libano* 2, *Hongkongo* 1, *Singapuro* 1, *Birmo* 1.

Interesa kazo estas *Turkio* (al kiu kontinento cetere apartenigi ĝin?): 9 (ĉiuj el Istanbulo – 5 ĉinoj, 1 germano – Thomas Bormann!). 3

Nun restas ankoraŭ kelkaj aliaj ekstereŭropaj landoj, pri kiuj ni disponigas jenajn ciferojn: *Ameriko: Brazilo 115!!!* (ĉu vere ĉiuj partoprenis?), *Usono 45, Kanado 26, Meksiko 25, Kubo 12, Argentino 6* (kie estas la „daŭripova“ efiko de la pasintjara kongreso?), *Kolombio 3, Nikaragvo 2, Venezuelo 2, Kostariko 1, Urugvajo 1, Ĉilio 1* (estrarano de UEA), *Dominika Respubliko 1.*

Aŭstralio 16, Novzelando 2.

Afriko: Konga DR 12, Benino 3, Komoroj 3, Niĝerio 3, Togolando 2, Ruando 1, Burundo 1, Senegalo 1, Sudafriko 1, Madagaskaro 1.

Laŭ mondopartoj la 100an Universalan Kongreson de Esperanto en 2015 en Lillo do konsistigis jenaj ciferoj kaj procentaĵoj de aliĝintoj:

Okcidenta Eŭropo: 1411 (t. e. 724 sen Francio), t. e. 52, 36%.

Orienta Eŭropo: 265 (PL, HU, BG, CZ, SK, eks-YU, AL, RO), 52 (LT, LV, EST), 71 (RUS kaj eks-SU). Sume 388, t. e. 14, 4%. *Eŭropo entute:* 1799, t. e. 66, 75%.

Azio: 412 (kun Japanio, Ĉinio kaj Koreio 308 kaj Turkio 9), t. e. 15, 3%.

Ameriko: 240 (kun Brazilo 115), t. e. 8, 9%.

Afriko: 28, t. e. 1, 04%.

Aŭstralio kaj Novzelando: 18, t. e. 0, 67%.

Laŭ la listo de (vivantaj) *Honoraj Membroj* de UEA aktuale ekzistas 46 personoj de tiu kategorio. 5 Iliaj nomoj estas kutime inkluzivataj en la listo de aliĝintoj al UK. Estas konate, ke ĉirkaŭ kvarono ĝis triono de tiuj honoraj membroj ne partoprenas en la UK. Sed tiuj ciferoj apenaŭ grave influas la ĝeneralan bildon aŭ statistikon.

5 Laŭ la listo (47) publikigita sub: https://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_honoraj_membroj_de_UEA

(minimume 1 persono intertempe forpasis, nome Hans Bakker)

Koncerne la movadan konatecon de la aliĝintoj, okulfrapas, ke la granda plimulto de iliaj nomoj ne estas internacie konataj (eble pli konataj ili estas en la naciaj kaj lokaj movadoj). En ĉi tiu kategorio ne estas klare, ĉu en ĉiuj kazoj temas pri veraj esperantistoj aŭ ĉu nur pri akompanantoj, familianoj (inter ili infanoj) kaj turistoj, kiuj parte malbone aŭ eĉ ne parolas Esperanton. Alia grupo aŭ kategorio de kongresanoj konsistas el tiuj, kiuj ĉiujare aliĝas kaj partoprenas en la UK. Ne necesas forgesi tiujn (elstarajn) esperantistojn, kiuj kutime ne aliĝas nek partoprenas en la UK; ilia foresto signifas grandan mankon por la kongresa programo.

Konklude pri la landa (aŭ geografia) deveno de aliĝintoj oni do povas diri, ke en la 100a Universala Kongreso de Esperanto partoprenis ĉefe homoj el Francio (ĉ. 700), Germanio (193), Japanio (166), Brazilo (115), Pollando (109). Tiuj landoj kune generis 1270 aliĝintojn aŭ 47, 12 procentojn; kun Belgio (90), Ĉinio (87) kaj Italio (85) la nombro de aliĝintoj sumiĝas je 1532 aŭ 56, 85 procentojn, do pli ol duono. Se tiuj grupoj ne ekzistus, la Universala Kongreso havus penon kolekti 2000 aŭ eĉ nur 1500 aliĝojn. Dume ili ankoraŭ ekzistas sed povas varii de jaro al jaro, depende de la kongresloko. Evidente tro malgrandaj estis la grupoj el Hungario, Bulgario, Hispanio, Baltaj Ŝtatoj, Slovakio, eksa Jugoslavio, Ruslando kaj eksa Sovetunio, Usono kaj Nordameriko. Grandaj delegacioj el orienta Eŭropo preskaŭ komplete forestis kaj la kapacitoj en okcidenta Eŭropo ŝajnas elĉerpiĝi (precipe draste en la kazoj de GB, NL, E/Cat, DK, S, SF, IS). Sendube modestaj estas ankaŭ la nombroj de aliĝintoj el Azio (kie vivas 60% de la homaro, nome 4, 351 mrd., sen Ruslando) kaj preskaŭ neglektebla estas la ciferoj pri Afriko. La Universalaj Kongresoj de la pasintaj jaroj (ekzemple Bergeno, Roterdamo, Kopenhago, Rejkjaviko, Bonaero) do esence ne povis generi kvante kaj kvalite novajn ‘amasojn’ da esperantistoj – ĝuste el tiuj landoj estis plej malmultaj UK-aliĝintoj.

Laŭ la prezentitaj ciferoj la krizo de la internacia Esperanto-movado do estas absolute videbla. Oni vidos kiom da homoj aliĝis al la venontjara UK en orienteŭropa Slovakio, kie la movado estas malforta kaj ne disponas pri tiel multaj „francoj“ kiel en Lillo. (Dum la franca Landa Asocio havas oficiale mil membrojn, la slovaka LA havas nur 70).

Do, sendepende de tio, ĉu aliĝis 2695 personoj el 80 landoj, la komuniko, ke estis aliĝintoj el 80 landoj, devas esti konsiderata esence kiel neta blufado, kvankam statistike eble ĝuste. Kiel supre montrate, la plimulto de aliĝintoj originis el nura deko da landoj.

Analizindaj restus la aĝo kaj reala Esperanto-scipovo de tiuj aliĝintoj kaj eventuale aliaj sociologie interesaj kaj esencaj aspektoj, ekzemple kiom da personoj aliĝis al la UK surbaze de diversaj varb- kaj lern-kampanjoj en la interreto, de kiuj la Esperanto-movado atendas miraklon de la renoviĝo, kiu verŝajne ne okazis/os, la ĉiujara 4

konstanteco kaj ŝanĝiĝo de la konsisteco de la aliĝantaro/partoprenantaro aŭ la esploro kiuj estas la aliĝintoj el Kubo, Vjetnamio, Ĉinio, Irano, t. e. kiun funkcion ili havas en siaj landoj, ktp. Por akiri tiajn sciojn estus grave fari integrajn enketojn inter la kongresaj aliĝintoj mem. Do, povas esti, ke Lillo estis por longa tempo kvante la plej granda kongreso, se oni ne kapablos allogi novajn publikojn, kiuj plene anstataŭos la pioniran kaj post-pioniran generacion, kiu praktike funkciis ĝis la kolapso de la komunismo en 1989-91, kio estis grava cezuro en la historio de la Esperanto-movado, kaj kiu nun estas elmortonta. Tiu sorto povus trafi ankaŭ Esperanton kaj ĝian movadon mem.

Verkita de Andreas Künzli kaj publikigita sur www.planlingvoj.ch en aŭgusto 2015.

(La aŭtoro, aliĝinta al la Esperanto-movado en 1979 kaj forlasinta ĝin antaŭ kelkaj jaroj, ne partoprenis en la 100a UK en Lillo kaj faris tiun analizon surbaze de statistikaj datenoj troveblaj en la interreto).

Aliaj artikoloj ligataj kun la temo:

Nombro de membroj de Landaj Asocioj de UEA: http://www.plansprachen.ch/Demokratiefeindliche_Toene_an_Esperanto-Weltkongress_2014.pdf

Komento pri la strategia vizio de UEA:

<http://www.planlingvoj.ch/UEA-strategio.pdf>

Enketoj pri eraroj de Esperanto:

http://www.planlingvoj.ch/Enketo2013_erarojEsperanto.pdf

13 hipotezoj pri Esperanto:

http://www.planlingvoj.ch/13_HIPOTEZOJ_PRI_ESPERANTO_2012.pdf

Cherpillod la Franco (recenzoj): http://www.planlingvoj.ch/Cherpillod_franco.pdf

100 jarojn post la morto de Louis Couturat (1914):

http://www.planlingvoj.ch/Couturat_100.pdf

© A. Künzli, Svislando. www.planlingvoj.ch, aŭgusto 2015.

Niaj membroj



Zamir Gjurgji, unu el niaj e-kursanoj en la jaroj 90, nuntempe ĵurnalisto

NOVAJ LIBROJ EN LA SCIENCA KAJ TEKNIKA ESPERANTO-BIBLIOTEKO

Lingvon oni lernas por utiligi ĝin. La uzado en sciencaj kaj profesiaj kampoj tamen postulas – krom la entuziasmo – ankaŭ terminarojn kaj fakajn esprimojn. Antaŭ ol verki iun ajn sciancun aŭ fakan artikolon oni devas konatiĝi kun la jam ekzistantaj terminoj, fakaj esprimoj kaj parolturnoj.

Ĉe "Scienca kaj Teknika Esperanto-Biblioteko", STEB estas kolektataj Esperantlingvaj teknikaj kaj natursciencaj artikoloj, verkoj kaj elektronikaj libroj - en formatoj pdf, html, doc, epub, kaj aliaj.

Liston de nove aldonitaj libroj ni publikigas de tempo al tempo en interretaj retlistoj kaj pere de Ret-Info. Se vi konas sciancun, teknikan verkon, ne registritan ankoraŭ en STEB, kun danko ni akceptas vian informon pri ĝia reta trovadreso, aŭ rekte ĝian dosieron mem.

STEB estas funkciigata de Lingvo-Studio en la Esperanto-Centro "Eventoj" en Budapeŝto.

Reteja adreso de STEB: <http://www.eventoj.hu/steb/> – oficejaj kunlaborantoj: Szilvási László kaj Mészáros István, kontakto: oficejo@eventoj.hu

Multajn dankojn al ĉiuj aktivuloj, helpantoj, kunlaborantoj!

Szilvási László

NOVAJ MATERIALOJ POST LA LASTA KOMUNIKO

- Ergard Budagjan: Kiam suno lumas, sed ne varmigas - artikolo en Scienco kaj Kulturo - meteologio/geologio
- Mineralproduktaĵoj por agrikulturo -- en Fokuso -- inĝenierado/ceteraj
- W. Bormann: Konjunktur-politiko - inter senlaboreco kaj inflacio -- direktado, ekonomiko
- W. Bormann: Mondkomerco kaj lingvo - specifaj lingvaj aferoj dum internacia komerco -- direktado, ekonomiko
- Prof. D-ro Rüdiger SACHS: Vitaminmanko en la nutraĵo de dombestoj en tropikaj landoj -- medicino
- Naturkuracado - kolekto de 69 fakaj artikoloj - medicino
- Bohuslav Hanák: Aerodinamiko de normala Rogallo-glisilo -- inĝenierado/aviado
- Trajtoj de laboro en dentoteknika laboratorio - en Stomatologia Forumo, 1983 -- medicino
- Eurovoc-tezauro en EU - de Jozef Hron -- vortaroj
- Kial kaj kiel manĝi vegane - populariga libreto pri veganismo -- nutrado kaj dommastrumado
- 4 vortaroj pri radiotekniko: DJ4PG Radioteknika Terminaro, DL1CU Ham's Interpreter, International Radio Manual, Radio-Terminaro -- vortaroj
- 19-a IMEK - resumo de la anglalingvaj prelegoj -- medicino
- Anglajura terminaro - Ian Jackson, Esperanta Jura Asocio -- vortaroj
- Du jardekoj da IKU - Amri Wandel -- miksitaj
- Animaloj - ĉ. 20. 000 esprimoj en latina, eo, de, cz - surbaze de [www. biolib. cz](http://www.biolib.cz) -- vortaroj
- Zooparko en Erfurt - dulingva gvidilo -- zoologio
- Likenoj de Okcidenta Eŭropo -- biologio

- Trimmatothelopsis versipellis - kladogeneza loko kaj taksonomiaj konsekvencoj -- biologio
- Manĝeblaj plantoj - Libreto kun priskriboj de 20 manĝeblaj, sovaĝaj plantoj, verkita de Lode Van de Velde -- dommastrumado
- Teleskopegoj - nro 3 de la naturscienca populariga revuo Globusoj, red. D. Bertrand -- astronomio
- Transkrania magneta stimulado kaj transkrania elektra stimulado (Mir-2014) -- medicino
- Klaus Schubert: La interlingvo de DLT -- ceteraj
- Richard Partecke: Malalta flugo permesata! (agroaviado) -- inĝenierado, aviado
- W. M. A. De Smet: La scienca nomo de la ĉimpanzo -- zoologio
- Behrouz SOROUSHIAN: Produktado de ultrarapidaj laseraj impulsoj -- fiziko

Stenografio - subfako ĉe direktado de entreprenoj

- *Stenografia sistemo T-linio - adapto al Esperanto - Pejno Simono, 2011*
- *Ni stenografas laŭ Germana Unueca Stenografio - kurso de W. &H. Wingen, 1980*
- *Nova Skribo - reformo de alfabeto kun nova, rapida skribsistemo - 1976*
- *Stenologio kaj stenografio - resumo - de Delfi Dalmau, 1961*
- *Lernolibro de Esperanta Stenografio - laŭ la sistemo Duployé, verkita de P. Flageul, 1932*
- *Originalstenografio - sistemo Brabbée, 1929*
- *Radnai-stenografio - mallonga prezento - verkita de Ludoviko Kökény, 1928*
- *Esperanta versio de Gregg Shorthand - en la angla lingvo. -- [pdf-versio]*
- *Rapidskribo Scheithauer*
- *Internacional Stenografio - gvidilo en Esperanto de F. DE Kunovski, 192?*
- *Esperanta Stenografio laŭ la sistemo de Gabelsberger - verkita de Albert Schramm, 1910*
- *Esperanta Stenografio laŭ la sistemo de Gabelsberger - itale - de Candido Boncolini*

- *Stenografio Internacia - AORO - de Rudolf Sprotte*

- *Langolaj minuskloj - sonsigna - de Martin Strid*

- Birdoj en la okcidenta palearkto - 4-lingva listo, LAT-EO-FR-GB, Thierry Tailhades -- vortaroj

- Strukturo kaj kvalito de alojaj nemiksiĝantaj - de A. D. Ŝljapin -- kemia industrio

- Sciencaj novaĵoj, interesaĵoj ĉe la Pola retradio - 1/2/3/4/5/6 -- miksitaj, diverstemaj verkoj

- Gazetara laboro por Esperanto - prelego de Lu Wunsch-Rolshoven -- direktado kaj ekonomiko

- El la fervoja mondo - 39 bultenoj kun fakaj novaĵoj de fervojoj - red. Jindřich Tomíšek - 2010/2011/2014/2015 -- inĝenierado - fervojoj

Se vi konas sciencajn, teknikan verkon, ne registritan ankoraŭ en STEB, kun danko ni akceptas vian informon pri ĝia reta trovadreso, aŭ rekte ĝian dosieron mem.


Szilvási László

REZULTO DE ENKETO - PRI KULTURAJ EO


Rezulto

UZADO


1. Kiom ofte vi aŭskultas esperantan muzikon/vidas muzikvideojn?




2. Kiom ofte vi vidas esperantajn filmojn?



3. Kiom ofte vi legas esperantajn librojn?



4. Kiom ofte vi ludas esperantajn komputil-/poŝtelefonojajn ludojn?



PRODUKTOJ

Kiuj interesiĝas pri analizoj kaj nombraj datumoj de Esperantujo, verŝajne kun ĝojo renkontis la rezultopanelon de la enketado pri Esperantaj amasmediaj produktoj (*muzikoj, filmoj, libroj, ktp.*).

La enketilon de Jonas Marx, germana, juna esperantisto (kantisto) plenigis 142 homoj en interreto, la enketa rezulto montras iliajn respondojn. Ĉe la analizado oni devas konsideri ke la nombroj montras ne la ĝeneralan sekcon de la Esperanta komunumo, sed de la plej aktiva, interretuma tavolo.

La enketila rezulto montras respondojn al 21 demandoj, kaj ĝi videblas en la retejo de J. Marx ĉe: <http://jonny-m.org/enketo/rezulto.php>.

Krimeo: UEA sekvu UEFA?



Grigorij Arosev

Sekvante ĉiaspacajn diskutojn kaj kverelojn ĉirkaŭ la rusia anekso de Krimeo mi, sincere dirante, plene forgesis, ke fakte povas ekzisti ankaŭ la "movada" flanko de la problemo. Sed nun, legante la raportojn post la okazinta [konferenco](#) de Rusia Esperantista Unio (REU), ĉiuj komprenis, ke la krimea demando efektive venis ankaŭ en Esperantujojn. [La reago de UEA](#), kiun voĉigis ties prezidanto Mark Fettes, pravas, ke la demando ankaŭ en Esperantujo tuj transformiĝis en la problemon.

Post aperigo de koncernaj novaĵoj en la Esperanto-gazetaro, ankaŭ en [La Balta Ondo](#), kaj specife post legado de kelkaj komentoj kaj sintenoj, iĝis klare, ke baze en Esperantujo regas pli-malpli samaj opinioj kaj kun la sama proporcio, kiel tutmonde. Laborante en granda germana novaĵentrepreno, mi konstatas, ke el la Okcidento la subteno de la anekso estas minoritata, el Ukrainio – preskaŭ nula, dum el Rusio – amasa. Jes, laŭ kelkaj komentoj oni apenaŭ rajtas juĝi pri la tuta esperantistaro, tamen ial mi supozas, ke ĉi tie la tendencoj estas la samaj.

Mi prezidis REU en 2010–2013 kaj nun demandas min: kiel ni (du preziditaj de mi estraroj en malsamaj konsistoj) devus agi, se la situacio estiĝus tiam? Kiel civitano, mi draste malaprobas la anekson de Krimeo, kiel ĵurnalisto mi strebas esti objektiva, sed kio pri la rolo de gvidanto de socia organizaĵo, kia estis/-as REU? Iu skribis tute pravan aferon: rusia organizaĵo devas agi konforme al la rusiaj leĝoj, laŭ kiuj Krimeo nun estas parto de Rusio.



Interese, ke la krimean demandon REU alfrontis ne marte 2014, sed julie 2015 – do preskaŭ 1, 5 jaroj post la anekso. Do longan tempon REU kvazaŭ ne rimarkis la problemon, kaj faris tute prave. Kial do ĝi nun rimarkis? Ĉar krimeaj esperantistoj sendis koncernan peton – aiĝi al REU kiel regiona organizaĵo (klubo aŭ asocio). Ĉu REU havis teorion eblecon ne akcepti la peton? Jes ja havis, sed por tio estis bezonata forta volo de ties gvidantoj, kiu ja evidente malestis. Sed oni (do ankaŭ en UEA) klare konsciis, ke la decido de REU estas tute natura, ne riproĉinda kaj, plej grave, leĝkonforma. Jes ja, REU estas integra parto de UEA, sed tio ne signifas, ke REU devas iri kontraŭ leĝoj de sia lando.

Se la problemo efektive aperus dum nia mandatperiodo, mi verŝajne farus jene: mi ĉiel strebus persvadi la konferencon prokrasti la la decidon pri la krimea peto kun la formulo, ke unue ni (REU) devas konsultiĝi kun UEA pri tio. Se tio ne funkcias kaj la konferenco malgraŭ tio akceptus la peton, mi sendube tuj demisius. Sed se tio funkcias, la solvo tuj fariĝus tasko de UEA, kaj fakte ĝi jam nun estas tia.



Ion konsili al Mark Fettes mi ne tro volas, sed laŭ mia kompreno UEA povus sekvi modelon de UEFA, la Eŭropa futbala unio. Fine de la jaro 2014 ĝi malpermesis al krimeaj futbalaj kluboj membri en RFS (Rusia futbala unio) kaj partopreni iun ajn rusian futbalan eventon – ĉampionadon aŭ pokalon. Samtempe UEFA esprimis pretecon finance helpi la krimean futbalon kaj establi lokan futbalan asocion, kiu estus ligita nek kun Ukrainio, nek kun Rusio. Simila vojo estas taŭga ankaŭ por UEA, kiu povas post traktadoj kun krimeaj esperantistoj iniciati kreon de aparta sendependa Krimea Esperanto-Asocio, kaj pripensi, kiaspecan helpon kaj apogon ĝi, UEA, povas doni al la novkreita organizaĵo. Tia neŭtrala kaj "sensanga" vojo estas la plej racia. Jes, tio sekvigas malpermeson, ke krimea klubo/asocio membru en REU, tamen UEA rajtas tion postuli, klare esprimante eventualajn sekvojn de malobeo. Same kiel REU rajtas ne obei la postulon de Roterdamo kaj eventuale eksmembriĝi el UEA. Mi opinias, ke UEA devas havi iom pli da kuraĝo ĉi-rilate.

Anoncoj kaj informajoj

Helpu la novan ekspozicion en la Esperanto-Muzeo en Svitavy

"ĈU ESPERANTO PERAS ION ALIAN OL LA KUTIMA VOJAĜADO?"

Kun subteno de la urba estraro en la urbo Svitavy ekde 2008 funkcias la Esperanto-Muzeo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ĝi situas apud la urba ĉefplaco, ĝian ekeston subtenis Muzeo pri Kulturo de Ĉeĥa Respubliko. Depost ĝia malfermo regule okazas tie publikaj ekspozicioj, la nuna havas la titolon "Esperanto kaj kolektado" (vidu: <http://www.ipernity.com/blog/181031/806146>).

Centra retejo de la muzeo estas: <http://www.muzeum.esperanto.cz/eo/>

La 26-an de septembro oni planas malfermi novan ekspozicion "*Esperanto ĉirkaŭ la mondo - alternativa maniero ekkoni fremdajn landojn kaj kulturojn*" - por kiu la gvidantoj de la Muzeo **petas vian helpon.**

La temo celos respondi al la demando: "*Kiutage Esperanto peras ion alian aŭ pli valoran ol la kutima vojaĝado (ĉu individua, ĉu kun vojaĝagentejo)?*"

La kolektita materialo servos ne nur por fizika ekspozicio, sed parto estos disponigita ankaŭ interrete aŭ utiligita por gazetartikoloj.


Estas aparte serĉataj:

- fotoĵoj pri interesa travivaĵo/situacio/aktivado kion vi spertis, aŭ nekutima loko, kiun vi vizitis dum vojaĝado per Esperanto
- mallonga rakonto (*ĉ. 1 paĝa*) pri io interesa/inspira, kion vi eksciis aŭ spertis pri la mondo pere de Esperanto (*vojaĝante, korespondante, legante*)
- sonregistraĵoj kun esperantlingvaj popolkantoj de diversaj landoj,
- mallongaj amatoraj videofilmoj (paroligitaj aŭ subtekstigitaj en Esperanto) pri vidindaĵoj aŭ kulturo de diversaj landoj.

Detalan priskribon pri la projekto kaj de la atendataj materialoj vi trovas en la retejo de la muzeo, aŭ ĉe la retejo de ĝia respondeculo:

Pavla Dvorská,

<http://www.ipernity.com/blog/181031/1584432>
Retadreso: muzea.ekspozicio@gmail.com



LA 52-AJ BALTIAJ ESPERANTO-TAGOJ (BET – 52) INVITAS

Litova Esperanto-Asocio afable invitas vin partopreni tradiciajn la 52-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-52). La aranĝo okazas sub aŭspicio de Universala Esperanto-Asocio (UEA).

DATO: La 2-10-an de Julio, 2016. BET okazas ekde 1959 ĉiujare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio.

LOKO: BET-52 okazos en la urbo BIRŜTONAS, kiu situas 40 kilometrojn for de Kaunas kaj 90 kilometrojn for de la ĉefurbo de Litovio Vilnius, apud la ĉefa rivero de Litovio Nemunas. Ĝi situas en la centro de la regiona nacia naturparko, ĉirkaŭita de belegaj pinarbaroj. BIRŜTONAS estas antikva kaj fama

balneologia kuraĉloko de Litovio, fondita en 1382. La urbo estas ideala loko por laboro kaj ripozo, ĝi estas facile atingebla buse kaj automobile. Eblos uzi multegajn (pli ol 50) diversajn kuracajn kaj sanigajn procedurojn kaj servojn, naĝejon, saŭnon, sportan salonon k. a. BET-52 havas subtenon, kunlaboron kaj diversflankan helpon de la urba municipo. La ĉefa lokalo de BET-52 estas bonege ekipita sanatorio *Versmé*. En BIRŝTONAS jam okazis BET-40 en 2004.

PARTOPRENO: ni invitas ĉiujn esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi esperantistojn el la landoj ĉirkaŭ la Balta Maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj najbaraj kaj pli foraj landoj.

ANTAŬ KAJ POST BET-52 estas ebleco laŭ moderaj prezoj aktive ripozi, plibonigi sian sanon, uzi multegajn sanigajn kaj kuracajn procedurojn kaj servojn, kuraci sin en unu el tri tre altnivelaj kaj modernaj sanatorioj kaj kuracejoj de BIRŝTONAS *Versmé*, *Tulpès* kaj *Eglè* aŭ en urbaj hoteloj, gastejoj, turismejoj kaj ripozejoj.

ALIĜKOTIZO:

- a) 25 eŭroj por esperantistoj el Estonio, Latvio, Litovio.
- b) 35 eŭroj por esperantistoj el ekssovetiaj landoj.
- c) 45 eŭroj por esperantistoj el ekssocialismaj eŭropaj landoj.
- d) 55 eŭroj por okcidentanoj kaj egaluloj.

Infanoj, lernantoj kaj studentoj aliĝkoton ne pagas. Pageblas en ajna konvertebla valuto.

ALIĜO: eblas aliĝi rete www.esperanto.lt/aliĝilo_BET.html. Pri aliaj aliĝeblecoj legu en retejo de la aranĝo.

PREZOJ de loĝado, manĝado, pageblecoj kaj aliaj financaj kaj aliaj kondiĉoj estas troveblaj en retejo de la aranĝo.

GRAVE: Esperantistoj, kiuj grave kontribuos al la programo de la aranĝo por la loĝado (krom hoteloj) aŭ manĝado laŭelekte ne pagos.

PROGRAMO: tradicia, t. e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, sciencteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, diservo, interkona vespero, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero.

ALIAJ GRAVAĴOJ: Aktualajn informojn pri BET-52 Vi povas trovi en retejo de BET-52 www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET52. Tie Vi trovos plenan kaj detalan Informilon pri BET-52. Krome,

informoj pri BET-52 estas konstante publikigataj en novaĵretejo *La Balta Ondo* (www.sezonoj.ru), novaĵretejo *Barelo* (www.barelo.blogspot.com) kaj en la revuo *La Ondo de Esperanto*.

KONTAKTADRESO: p. k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Poŝtelefonoj de LEA estas [+370-687-12219](tel:+370-687-12219); [+370-686-69875](tel:+370-686-69875). Telefakso estas: [+370-37-228616](tel:+370-37-228616). Retadreso de LEA estas: litova_ea@mail.lt; irenaa@takas.lt; pjedorovas@takas.lt. Retejo de BET-52 estas www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET52.

BONVENON AL LITOVIO !



68-a kongreso de IFEF de la 21-a ĝis 28-a de majo 2016 en Varna, Bulgario

Temo de la Kongreso: Unuigita Eŭropo bezonas ESPERANTON!

LKK: retadreso: bg_68ifk@abv.bg

68-a Kongreso de IFEF, Bulgario, Sofia-1326, z. k "Obelya-2", bl. 209/A/5

Bank-konto: First Investment Bank, SOFIA 1233, ul. "OPALCHENSKA" 117

IBAN: BG38FINV91502016206231, BIC: FINVBGSF

Penka Dimitrova Dilova

ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ

1. Ĉiu partoprenanto bonvolu plenumi kaj sendi apartan aliĝilon por la kongreso kaj por la postkongreso al adreso de LKK.
2. Sendu la pagon nur en eŭroj, al la indikita bankkonto de la LKK. Oni traktos la aliĝilon nur post la alveno de la pago. Vi devas pagi bankelspezojn (inkluzive por la bulgara banko).

3. Kongreskotizo ne estos repagebla. La pagoj por la ceteraj servoj estos repageblaj post la dekalkulo de 10% pri administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la malmendon antaŭ la 15-a de marto 2016.
4. LKK konfirmos la akcepton de ĉiu aliĝilo post la ricevo de la koncerna pago kun indiko de via kongresa numero kaj de ĉiuj antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj servoj.
5. LKK havas la rajtojn ŝanĝi la prezojn, se inflacio aŭ aliaj neantaŭvideblaj kondiĉoj postulus tion.











































































Nia propagando

Esperanto en bildoj



 pomo	 orango	 akvomelono	 ananaso	 vinbero	 brasiko	 piro
 persiko	 banano	 mirtelo	 tomato	 terpomo	 mango	 kukumo
 cepo	 papriko	 frago	 averoo	 papajo	 laktuko	 fungo
 citrono	 kivo	 liĉio	 guŝo	 ignamo	 karoto	 kukurbo
 spinaco	 grapfrukto	 fazeolo	 ĉerizo	 brokolo	 melono	 ĉajoto
 jakvo	 rafano	 figo	 gujavo	 olivo	 pasifrukto	 kapsiko
 maizo	 rizo	 pruno	 manioko	 frambo	 florbrasiko	 gvaranao
 apio	 ajlo	 manjoketo	 sukerpomo	 avokado	 melongeno	 petroselo
 napo	 pizo	 abrikoto	 palmomedolo	 mandarino	 kreso	 akajuo
 granato	 kokoso	 asparago	 persimono	 sukerkano	 beto	 zingibro

Kia vi sentas vin hodiaŭ?



ELĈERPITA



KONFUZITA



EKSTAZA



KULPA



SUSPEKTA



KOLERA



HISTERIA



FRUSTRITA



TRISTA



MEMFIDA



EMBARASITA



FELIĈA



PETOLEMA



NAŬZIGITA



TIMIGITA



FURIOZA



HONTA



ZORGA



FIMEMKONTENTA



DEPRIMITA



SUBIGITA



ESPERPLENA



SOLECA



ENAMIĜINTA



JALUZA



ENJA



SURPRIZITA



ANKSIA



ŜOKITA



TIMIDA

© 1985, Creative Therapy Associates, Inc., Cincinnati, Ohio
1-800-448-9145

Esperanto

The easiest language in the world

All nouns end with -o

All adjectives end with -a

granda elefanto



rapida aeroplano



-j for plurals

anasoj



All verbs end with..

infinitive = -i

present = -as

past = -is

future = -os

Esperanto

The easiest language in the world

All nouns end with -o

All adjectives end with -a

granda elefanto



rapida aeroplano



-j for plurals

anasoj



All verbs end with..

infinitive = -i

present = -as

past = -is

future = -os

- Reklamknabino



Reklamknabino

toksikaj homoj ene la movado

Kion fari ?

aroganta

hipokrita

mokemulo

klaĉema

kulpigulo

neŭrozulo

mediokrulo

enviema

egoisto

aŭtoritata

agresema

manipulanto

plendemulo

diskalifikulo



KIEL VI FARTAS?







How To Say "Squirrel" In Europe

- From Proto-Slavic "veverka" (red)
- From Proto-Slavic "vjeverka" (orange)
- From Proto-Germanic "aikwernô" (yellow)
- From Proto-Baltic "warc" (light blue)
- From PIE "wer-" (light grey)
- From Latin "sciurus" (brown)
- From Proto-Finnic "groba" (green)
- From Ancient Greek "σκιουρος" (light green)
- From Persian "سنجاب" (sanjâb) (purple)
- From Turkic Origin????? (dark purple)
- From common etymological root (1)????? (pink)
- From common etymological root (2)????? (light pink)
- From common etymological root (3) *From PIE (light blue-grey)
- Others????? (white)








Kelkaj Fruktoj kaj legomoj.



PROFESIOJ EN ESPERANTO



Instruistino.



Kuracisto.



Flegistino.




Kudristino.




Kelnero.



Kuiristino.



Artistino.



Studento.



Sekretariino.



Agrikulturisto.



Ĝardenisto.



Floristino.



Leterportisto.



Purigistino.



Fajrestingisto.



Buĉisto.



Kombistino.



Razisto.



Taksiisto.




Policisto.



Futballudisto.



Kasistino.



Fotisto.



Mekanikisto.



ruĝa pomo



sangoranĝo



ĉerizoj



oksikokoj



ruĝaj vinberoj



grapfrukto



ruĝa piro



granato



framboj



frago



akvomelono



ruĝaj betoj



ruĝa kapsiko



ruĝa brasiko



rafaneto



salatcikorio



ruĝa cepo



ruĝaj terpomoj



rabarbo



tomato

SUFIKSO "IL"

			
KOMBAS	KOMBILO	BALAAS.	BALAILO
			
RAZAS	RAZILO	SEGAS.	SEGILO
			
TRANČAS	TRANČILO	TONDAS.	TONDILO
			
GLITAS	GLITILO	BATAS.	BATILO

SUFIKSO "IN"

			
REĜO	REĜINO	LEONO	LEONINO
			
KNABO	KNABINO	KOKO	KOKINO
			
BOVO	BOVINO	FIANĈO	FIANĈINO
			
KELNERO	KELNERINO	CERVO	CERVINO

SUFIKSO "AĴ"

			
OVO	OVAĴO	PASTO	PASTAĴO
			
BALAAS	BALAAĴO	PAKAS.	PAKAĴO
			
FOSAS.	FOSAĴO	ĈASAS.	ĈASAĴO
			
DESEGNAS.	DESEGNAĴO	FOTOGRAFAS.	FOTOGRAFAĴO

PREFIKSO "MAL"

			
JUNA VIRO	MALJUNA VIRO	FORTA VIRO	MALFORTA VIRO
			
DIKA VIRO	MALDIKA VIRO	BELA VIRINO	MALBELA VIRINO
			
KOVRITA POTO	MALKOVRITA POTO	FERMITA PORDO	MALFERMITA PORDO
			
ŜLOSITA PORDO	MALŜLOSITA PORDO	PLENA KESTO	MALPLENA KESTO

Bestoj (1)



muso aŭ rato



kato



hundo



kuniklo



koko



kokino



kokido



testudo



porko



ŝafo



ŝafino



bovo



bovino



bubalo



ĉevalo

Bestoj (2)



tigro



jaguaro aŭ
leopardo



krokodilo aŭ
kajmano



baleno



heliko



serpento



simio



apro



elefanto



polpo



centpedulo
aŭ kolopendro



formiko



abelo



dromedaro



kamelo

Ĉiu esperantisto havas amikon, kiu estas...



100. 000 REGISTRIGOJ POR LA ESPERANTO-KURSO ĈE DUOLINGO

Hieraŭ registriĝis la 100. 000-a t. e. CENT-MILA persono por lerni Esperanton pere de la anglalingva kurso ĉe la retejo Duolingo!

La kurso ekzistas nur ekde la 28-a de majo, ĝi ankoraŭ estas en la beta fazo, sed jam ekzistas pluraj personoj, kiuj sukcese finis ĝin!

Reteja adreso: <https://www.duolingo.com/course/eo/en/Learn-Esperanto-Online>



Nov-jork', Nov-jork'!



ESPERANTO-KURSO EN LA URBO, KIU NENIAM DORMAS

PREZANTANTO: MARK FETTES

ORGANIZANTO: ESTHER SCHOR

INSTRUISTO: BILL MAXEY

Festu kun ni

la Eŭropan Tagon de Lingvoj

je la 26a de septembro!



Kio estas la Eŭropa Tago de Lingvoj (ETL)?

Ĝi estas tago por festi la eŭropan plurlingvecon kaj stimuli lingvolernadon.

Laŭ iniciato de la Konsilio de Eŭropo en Strasburgo oni ekde 2001 festas ĉiujare la Eŭropan Tagon de Lingvoj je la 26a de septembro.



Kial ni festas la ETL-on?

- Por konsciiĝi homojn pri la graveco de lingvolernado por la kreskigo de plurlingveco kaj interkultura interkompreniĝo
- Por diskonigi la riĉan lingvistikan kaj kulturecan diversecon de Eŭropo
- Por stimuli dumvivan lingvolernadon en- kaj eksterlerneje

Ĉu vi sciis, ke...?

- En la tuta mondo ekzistas inter 6.000 kaj 7.000 lingvoj kun ĉirkaŭ 225 indiĝenaj lingvoj en Eŭropo
- Plej multaj lingvoj de la mondo estas parolataj en Azio kaj Afriko
- Almenaŭ duono de la monda popolo estas du- aŭ plurlingva, t.e. oni parolas aŭ komprenas du aŭ pli da lingvoj
- Dulingveco faciligas la lernadon de kromaj lingvoj kaj plibonigas la penskapablon

Iru al nia retejo por pliaj faktoj!



Por kiuj ĝi estas?

- Lernantoj, studentoj, instruistoj
- Universitatoj, lernejoj, kulturaj kaj lingvaj institutoj
- Organizoj, ...

Fakte por ĈIUJ kiuj volas festi lingvan diversecon en Eŭropo



www.coe.int/EDL



Iru al nia Facebook-paĝo:
facebook.com/ecml.celv



EUROPEAN CENTRE FOR
MODERN LANGUAGES
E C M L
C E L V
CENTRE EUROPEEN POUR
LES LANGUES VIVANTES

COUNCIL OF EUROPE
CONSEIL DE L'EUROPE

Festu kun ni la Eŭropan Tagon de Lingvoj je la 26a de septembro!

Kio troveblas en la retejo de ETL?

- Kalendaro de eventoj en la tuta mondo kun aktivaĵoj organizitaj por festi la Tagon
- Informoj pri la ETL, ĉi-momente en pli ol dudek lingvoj
- Faktoj kaj ciferoj pri lingvoj
- Materialoj por instruistoj kaj organizantoj de eventoj (kun ekzemploj de ETL-eventoj kaj aktivaĵoj)
- Interretaj ludoj por testi viajn lingvokonon kaj -kapablojn
- Esprimoj, amuzaj vortoj, falsaj amikoj, plej longaj vortoj, palindromoj, langorompiloj kaj multaj aliaj ekzemploj pri similecoj kaj malsamecoj el la riĉa lingvopejzaĝo de Eŭropo
- Ilo per kiu eblas voĉdoni por la plej originala evento

Kiel mi povas partopreni en la Tago?

Ĉiuj memboŝtatoj, partneroj kaj individuoj povas organizi aŭ kunorganizi aktivaĵojn kaj rajtas ĉerpi ideojn, materialojn kaj reklamilojn el la ETL-retejo.

KELKAJ IDEOJ

- Organizi eventon kiel lingvokunvenon, feston, turneon, bufedon, ...
- Komenci prilingvan blogon
- Verki e-libron aŭ e-revuon
- Mem krei lingvokvizon por viaj studentoj, lernantoj, najbaroj, amikoj, ...
- Organizi konkurson aŭ ludon pri poŝtkartoj, afiŝoj, videoj, fotoj, verkado aŭ kantado

Diskonigu vian eventon kaj registru ĝin en la datumbazon de la ETL-retejo.

Multaj pliaj ideoj kaj materialoj por instruistoj troveblas en <http://edl.ecml.at/teachshare>.

Kiu kunordigas la Tagon?

La Eŭropan Tagon de Lingvoj kunordigas la Lingvopolitika Departemento de la Konsilio de Eŭropo (Strasburgo) kaj la Eŭropa Centro por Modernaj Lingvoj (Graz) de la Konsilio de Eŭropo.

ETL-on subtenas naciaj kunordigantoj en pli ol kvardek landoj. Ili distribuas promociilojn kaj disfamigas la Tagon.

Fondaĵo www.edukado.net
Katalin Kovats, direktoro
NL-2593 RP Den Haag
Sparwaterstraat 74
Nederlando
+31648926081
redaktanto@edukado.net
katalin.kovats@gmail.com



Niaj leteroj

- **Letero de Katalin Kovatc**

Saluton, kara uzanto,
la redaktoro de edukado.net informas vin ke aldoniĝis nova ero ĉe Novaĵoj. Jen estas kelkaj informoj pri ĝi:

Titolo: HURA, ni sukcesis fari novan paŝon antaŭen!

Kategorio: Laste ĉe edukado

Teksto:

Mi kun granda ĝojo komunikas la vi, ke ni sukcesis.

La Eŭropa Centro de Moderaj Lingvoj (filio de la Konsilio de Eŭropo) akceptis plian dokumenton de ni, kaj ĵus sendis al mi la Esperanto-version de la ĉi-jara kampanjo-broŝuro, kies tekston antaŭ kelkaj semajnoj mi sendis al ili. Morgaŭ ĝi aperos inter la aliaj lingvoj, dekstre, sube, sur ilia ĉefpaĝo <http://edl.ecml.at/>.

Mi esperas, ke baldaŭ ni povos paŝi pli antaŭen, ĉar ankaŭ aliaj tradukoj estis senditaj por ke ilia paĝaro pli kaj pli verdiĝu.

La nuna sukceso estas rezulto de plurjara laboro kaj lingvopolitika agado. Sed certe multe helpis, ke pli ol 30 Esperanto-aranĝoj estis registritaj en la pasintaj tagoj en la Evento-kalendaro de la paĝaro, kaj dekoj da personoj plenigis la memtaksilon pri siaj Esperanto-konoj.

Bonvolu vidu kiel vi povas plu helpi.....

Legu pli ĉe la paĝo: <http://edukado.net/novajhoj?id=571>

Atendas vian viziton la redaktoro de edukado.net

- Estimataj kolegoj,

mi trovis vian ret-adreson sur la retpaĝo de la sekcio de ILEI.

Mi estas esperantisto el Francio kaj komencis, kun du aliaj personoj, realigi projekton de nova internacia Esperanto-lernolibro. Tiun projekton subtenas la franca landa organizo UFE, kaj la franca sekcio de ILEI.

Ni estas serĉantaj esperanto-instruistojn, kiuj akceptus testi nian materialon en siaj kursoj. Ni bezonas testantojn el diversaj kulturoj, por garantii la internaciecon de la materialo. Ni esperas, ke la testantoj helpos nin per siaj rimarkoj plibonigi ĝin antaŭ ĝia definitiva formo.

Vi trovos pli da detaloj en la jena dokumento:

http://www.ins-eo.org/stokejo/alvoko_Testantoj_Lernolibro2.pdf

Ni invitas vin plusendi ĉi tiun mesaĝon al la membroj de via sekcio. Se ili interesiĝas, ili kontaktu nin kiel eble plej frue.

Antaŭdankon pro via perado!

Kristof Chazarein

- **Partoprenu en projekto de nova internacia lernolibro-fariĝu testanto!**

Tri personoj komencis labori super projekto de nova Esperanto-lernolibro, subtenata de la franca landa asocio UFE kaj de la franca sekcio de ILEI. Nia intenco estas proponi al la Esperanto-instruistoj, kiuj

deziras apliki aktualajn metodojn, taŭgan kaj allogan materialon.

Jen ni prezentas la ĉefajn punktojn, kiuj karakterizas nian projekton:

ĝi estos **internacia** - t. e. uzebla en kiel eble plej diversaj naciaj kunteksto. Ĝi estos tial verkita tute en Esperanto (sen nacilingvaj adaptoj).

ĝi estos **por plenkreska publiko** - t. e. taŭga ekde proksimume la 16-jara aĝo.

ĝi estos **por komencantoj** kaj kondukos ilin ĝis la nivelo B1.

ĝi estos specife planita **por grupa instruado** (do netaŭga por memlernado).

ĝi estos **konforma al la KER-ekzamensistemo**.

ĝi estos **moderne dezajnita**, kaj ilustrita per koloraj bildoj kaj fotoj.

ĝi elmetos la lernantojn al **vivanta lingvo** pere de diversaj vidaj kaj sonaj dokumentoj, ĉerpitaj

precipe el la Esperanta mondo.

ĝi instigos la lernanton al **aktiva lernado**, en kiu ili mem trovu la regulojn de la lingvo per

observado, cerbumado kaj ĝeneraligo surbaze de ekzemploj.

ĝi instigos interhelpadon kaj kunlaboradon kaj motivos ilin proponante **la realigadon de projektoj.**

Post periodo da maturiĝo tiu projekto eniris sian fazon de verkado, kaj ni baldaŭ bezonos testigi la materialon. Ni do serĉas homojn, kiuj gvidas kursojn en plej diversaj landoj kaj kunteksto, por komenci la testadon **en Oktobro 2015.**

La testantoj estu pretaj raporti detale pri la testado, por ke ni povu konsekvence plibonigi la materialon kaj prepari la finan version.

Se nia projekto interesas vin, ni invitas vin kontaktiĝi kun ni kiel eble plej frue.

Kristof (aŭtoro)

retadreso:

ch.chazarein@gmail.com

profilpaĝo ĉe Edukado.net:

[kristof](#)

Marion (aŭtoro)

retadreso:

marion.quenut@laposte.net

profilpaĝo ĉe Edukado.net:

[Marqnt98](#)

Axel (kunordiganto)

retadreso:

axel.rousseau@esperanto-france.org

profilpaĝo ĉe Edukado.net:

[Axel584](#)

- Saluton,

Dum **Kheira**, la gvidantino, laboras kun la infanoj, desegnigas kaj skribigas ilin, mi (**Fransoazo**) kontaktis infanojn en Azio, Ameriko, Afriko kaj Eŭropo.

Multaj respondoj alvenis de infanoj kaj instruistoj kiuj deziras ke ni sendu nian bildstrian rakonton kontraŭ rasismo kiam ĝi estos preta.

Kelkaj eĉ sendis sian poŝtan adreson, fotojn, nomojn kaj aĝojn de la infanoj... Granda plezuro!

Unu afrika instruisto perskajpe jam babilis kun Daniel, lanĉinto de nia projekto.

Aziaj infanoj jam sendis ilustritan fabelon! Dankon Tomoko pro la sendo!

Daniel, la vicprezidento de la kunlaboranta asocio Francas82, fiere montras la ricevitajn fabelojn.

RIGARDU NUN LA RETEJON KIUN FARIS DANIEL, LI MEM REALIGIS MULTAJN LIBERE
ELŜUTEBLAJN LUDOJN POR INFANOJ! <http://reseauesperanto82.jimdo.com/telechargements/>

Kore,
Françoise NOIREAU

- Kara amiko,
Antaŭ ĉio, permesu sinprezenti antaŭ vi. Ja, mi nomiĝas s-ro Honoré Sebuhero Ndarihorange, edziĝis, kun 5 gefiloj loĝanta en orienta provinco kivu /DRKongo sed mi gastigas unu orfinon de 13j hejme. Tiu ĉi ne havas gepatrojn eĉ unu el liaj familianoj. Ĉiuj estis mortigitaj dum la pasinta milito (2010).
Mi ne povas forgesi sciigi al vi, ke ni loĝas en teritorio Rutshuru kiu troviĝas je 75km de Goma urbo. Rutshuru estas centreto kiu estas apud la landlimo de nia najbara lando Ugando. Tial ni uzas ofte poŝtadreson el ugando sed ni estas konganoj. En nia loko ne ekzistas plu poŝtservo.
Mi esperantigis de 2006, kaj iĝis individua ano de UEA(UEA Konto: hose-t). En 2009 mi mem kreis aktivan e-klubon (Verda Stelano-Klubo(vsklubo@gmail.com)). En 2012 mi enkondukis E-instruadon en nia instituto Béthanie Rutshuru ĝis nun.

Ni volas amikiĝi kun vi per koresponde kaj interŝanĝi niajn kulturojn kun nia E-grupo (Verda Stelano -Klubo el Rutshuru/Orienta Kivu/DRKongo). Ni volas krei ĝimelaĝon travia E-Asocio aŭ Klubo. Ni ŝatas naturon(ekologio), turismon, kulturon, legaĵon, ktp. Mi estas laborulo E-Instruisto pri zoologio, matematiko, Esperanto en tiu ĉi lernejo Instituto Bethanie.

*Ni jam enkondukis E-kurson en la orfejo de la pasintaj jaroj 2011.

Plie,

*ni jam enkondukis E-kurso en stacio Radio Alliance FM/civito Kiwanja. Ĉiu sabate ni elsendas E- mesaĝojn, informojn, Kursojn , kantaĵojn, ktp,

*Nia E-klubo V. S. K jam kreis alian Sub sekcion Amikeca E-Klubo-n en Tongo loko je 18 km. Tiu klubo estas gvidita de Innocent Baraka.

Esperanto en Afriko floras. Ni ne ĉesu progresigi nian karan lingvon en la kvaraj tutmondaj anguloj.

Ni neniam forlasis esperanton ĉar ĝi kunigas multajn naciojn. Plie, pere de tiu ĉi ni komunikas kun la tuta mondo. Verdire, kiam mi aŭdas la vorton(esperanto) mi sentas admiron, flugon, inspiron kaj ĝojon. Do, mia vivo estas firme ligita kun E-o kaj kun miaj geamikoj. Fine, mi ĝuas ne nur la lingvon mem, nek la ŝatatan de mi legadon de E-libroj, mi ĝuas ankaŭ la interrilatojn de la klubanoj. Restu kunligita por esti en ronda familio. Ni multe intershanghos esperantajn ideojn pri la diskonigo de nia karega lingvo Esperanto.
Plej amike!

Honoré Sebuoro
Eglise CEBCE REMERA
PO BOX 08 BUNAGANA
KISORO/UGANDA.
RETE: honsebn@gmail.com
Tel. [+243 99 78 52 933](tel:+243997852933)

- **Nicolino Rossi**

kaj ankaŭ la jenan poemon, pri Sicilio, kiun la aŭtoro plurfoje devis forlasi kiel politika persekutato de la fashisma reĝimo antaŭ la dua mondmilito.....

Insulon mi forlasos

Detruos mi pioĉbate mian domon. Tegmenton mi ne havos superkape, tagfine mi ekvolos stelojn enfermi ĉi-okulen. Insul', kiel vi etas, kaj karas vi kiel amo kiun endas forlasi. Ĉirkaŭ vi estas maro kaj ankaŭ sube de vi jen maro kaj vi estas kvazaŭ foli' flosanta. Tiel, mi detruos l' domon de vi donitan kaj havos kapkusene la teron de l' mondo. Delonge mi vin forlasas! Jen mi via ido, bela malfeliĉa patrujo de l' senhejmaj. Plu hodiaŭ vin mi forlasas kaj por rigardi vian dolĉan teron restas nur ĉielo bluokula.

- Saluton,

hodiaŭ mi atenteme legis la Bultenon kaj mi volasa sciigi al vi, ke ĝi estas interesa kaj mi dankas pro via sendo.

Jindřiška Drahotová, Ĉeĥio.

- Mi ege gratulas vin pro tiu tiel riĉenhava bulteno, kiu donas al ni vivaĵojn de nia komuna lando - ESPERANTUJO, kaj ankaŭ de via nacia lando - ALBANIO.

Amike,

Josenilton, Madragoa kaj Tamires.

- Kara Samideano redaktoro

Kiel vi fartas? Frue ni alvokos artikolojn pri Internacia Lingvo Esperanto kaj mi petas vian helpon por inviti gesamideanoj por partopreni skribante ĝin.

En ĉi numero de IF-Sophia Revuo ni povos pripaloli ĉio aferoj de nia movado: instruo, kulturo, laboro ktp.

ĉu vi povas helpi min disvastigi ĉi tiu alvoko?

Frate,

José Provetti

José Provetti Junior <jose.provetti@ifpr.edu.br>

- Sauton kara amiko!

Jen la fotoj, pri kiuj mi skribis jam al vi, la protesto de azianoj en Londono. Ĉu ne timu la hungaroj aŭ aliaj eu'ropanoj? Mi scias, ke la plej granda parto de la migrantoj certe estas pacemaj, sed se ili trovus alieman estron, neniu scias kio okazos enestonte, ĉar ilia kvanto ĉiam pligrandiĝas, ilia alveno ne ĉesas. Povos esti post kelkaj jaroj, ke en nia patrujo ni hungaroj estos la etno...

Alia afero.

Kiam komenciĝis ĉi migrado, mi aĉetis libron per la priskribo de la diversaj eĉ pri la plej grandaj religioj, ja mi ŝatus scii kiajn principojn havas ili, kia estas inter ili mem la Islamo. Nu, mi vidas, ke mia pensmaniero iom similas al la islama pri tio, ke la tempon de kreado de ĉi mondo ĝi ne pridecidas laŭ dato kiel la Torao faras kaj la Biblio de kristanoj. Antaŭ eble 4 du jaroj mi koncise aŭskulti prelegojn de youtube, laŭnome prelegojn de la Ezoteria TV. Ĝi ne estas scienca, sed ĝiaj parolantoj rolantaj en la programo (György Száraz kaj Zoltán Horváth) estas multflanke kultivitaj, kiuj multe legas el diversaj lingvaj ankaŭ sciencaj revuoj. Mi ne povas akcepti ĉiun de ili aŭditajn, sed tamen mi kapablas ekkoni faktojn pro la mondo ĝis nun nekonatajn. Laŭ tiuj mi provis jam serĉi en Youtube prelegojn kaj priskribojn alilingve kaj kelkajn mi kapablis kontroli, ke tiuj veras. Mi legis pri tiuj kaj germanlingve kaj angle, (enesperanto ne), do mi devis pripensi la aŭditajn. Nu, ekde tiam mi sciiĝis pri tio, ke por pensi kaj alta-teknike agemaj vivantoj ekzistis jam antaŭ 2 miliardoj da jaroj, estis por mi ege interesa, ja en Ameriko oni trovis en rokaĵo rulsuron en tiu materio kiu povis estiĝi antaŭ du miliardoj da jaroj kaj ne antaŭ 5 miloj da jaroj, pri kiu parolas la kristana biblio. Krome estas tie piramidoj da Egipto, Meksikio, Serbio, Kambodĵo... kiuj eble estas multe pli aĝaj ol 5 miloj jaroj. Krome, same en Meksikio oni trovis riverajn ŝtonetojn sur kiujn estas ĉizitaj tiaj operaci-metodoj, kiuj estas nek nun konataj sed kelkaj el ili jam estas eltrovitaj de la nuna homo. Krome same en Meksikio estiĝis trovitaj riverŝtonoj, sur kiuj estas troveblaj ĉizitaj bildoj: montrantaj kiel direktas infanoj dinosaŭrojn. Pripensu! Tiuj

bestoj formortis ankaŭ 60 milionoj da jaroj, kaj nun estas troveblaj rokaĵoj en kiuj en proksimeco de unu de alia videblas piedspuroj de dinosaŭro kaj la nuna homo. El tiuj prelegoj mi ekkomprenis, ke sur planedo Tero antaŭ ni jam ekzistis pli fruaj vivaĵoj eĉ hom-specioj (homidoj), kiuj aŭ travivis la monskalajn katastrofojn aŭ ili estiĝis denove kreitaj de Dioj, aŭ eksterteranoj nomitaj de ni Kreantoj. Povas esti, ke ili loĝas sur Luno aŭ sur Marso, aŭ vivas inter ni, sed ili ne influas sorton de la tera mondo, do lasas evolui kaj eksplodi neniigajn militojn. Ili nur tiam ekagas denove, ki9a9m malaperas pro io la homa gento desur la planedo Tero. Nu, mi akceptas principon de Korano, kiu ne decidas tempon de la kreado.

Mi ne volas ĝeni vin plu. Mi skribas nur tiun kroman, ke mi ne povas akcepti Jezuon kiel filkon de dio, laŭ mi li estis nur profeto kia estis ankaŭ Mohamedo, alta spiritaj homoj estis ili.

La turka regado de Granda Hungarujo okazis dum 150 jaroj, ili volis ne disvastigi Islamon, ili nur okupis la terenon. Sed laŭ la bildoj montritaj ni devas pensi, ke ĉi tiu branĉo de islamo volos islamigi kaj Eŭropon kaj Azion, kaj Amerikon, kie estas tiuj batalantoj jam grandnombre laŭ mia scio. Mi esperas, ke ni la diversreligioj kaj diverskulturojn havantaj tamen kapablos pace vivi unu kun alia kaj neniam okazos genocidoj inter la malnovaj kaj novaj loĝantoj de Eŭropo...

Elkore via samideanino

Adri

- Kara redaktoro

mi estas en mia kampara domo en Rocca de' Baldi, provinco de Cuneo, 80 km sude de Torino.

Mi ne scias kiel funkcias WAYN por legi vian mesaghon kaj por respondi al vi.

Mi nur scias ke en la klasika araba lingvo WAYN signifas apartan vinberon

el kiu oni ech en Arabio produktis vinon. La vorto fakte havas la saman etimologion de esperanta VINO.

Mi ghoje informas vin ka antau unu kaj duonjaro mi farighis avo por la kvina fojo: de Francesco, la tria ido de mia filino Selma, shia dua maskleto.

Tre kore kaj amike salutas vin

Fabrizio

tel. [++39 011 8178242](tel:+390118178242)

<[fabrizio. a. pennacchietti@gmail. com](mailto:fabrizio.a.pennacchietti@gmail.com)>

Koran dankon kara. Ne prikonsideru Wayn, ĝi sendas aŭtomate mesaĝojn, mi jam skribis al mia listo ke oni simple ignoru tion. Cetere mi ĝojas kun vi ke vi fariĝis la kvinan fojon avo! Longan vivon al la bebo.

Mi pasigis du semajnojn en Milano ĉar ankaŭ mi fariĝis la trian fojon avo. La nepo nomiĝas Lorenzo.

Ĉion bonan, kaj dankon pro la ekspliko de la etimologio de la vorto Wajn...

Amike Bardhyl

Mi jam klarigis ĉiujn el mia listo ke oni simple ignoru tian informon kio venas al ili aŭtomate, ne de mi, dankon, Bardhyl

- Jam de tre longe (minimуме 2 monatojn) mi sendis la promesitan libron al vi. Mi konstatas kun bedauro ke ghi ne alvenis, "Tri semajnoj en Sovetunio", Lanti. Estis valoro libro, mi perdis ghin favore al shtelisto. Mi ne komprenas, ke viaj shtelistos scipovas Esperanton. Iam mi sendis al Shaban belan libron, hodiau netroveblan kun fotoj pri Albanio de fratoj Marubi (komence de la 20a jarcento, li neniam ricevis ghin. Mi jam skribis al vi ke mi sendis la libron. Bedaurinde ghi estas perdita. Robert Pontnau

Mi sendis ghin meze de junio. Nenia dubo, oni shtelis ghin. Mi ne komprenas, la libro estas ja en Esperanto. Alian mi ne havas nek trovos. Robert

- Ankaŭ mi bedaŭras kara amiko. Mi ĝojus ke kelkiu ŝtelu ĝin por legi. Dum la komunisma tempo tiaĵojn ŝtelis mem la ŝtato, nome la Sekureco... Amike Bardhyl

- Antau la okuloj de la homaro, en kiu unu miliardo de homoj suferas malsaton, la rusoj detruas grandkvante nutrajhojn el Okcidento.
<http://www.n-tv.de/politik/Putin-weitet-Embargo-aus-article15719046.html>
La rusa embargo nun trafas ankaŭ Albanion, Islandon, Montenegron kaj Lihtenŝtejnjon kaj ekde januaro ankaŭ Ukrainion.
Ec la Komunisma Partio de Ruslando akre protestis kontraŭ la detruado de nutrajhoj.

Rusoj pretigas sin por la "granda milito"

En Ukrainio la donbasaj ribeluloj, kiuj estas subtenataj de Ruslando, atentigis pri la baldaua eksplodo de "granda milito"

<http://www.welt.de/politik/ausland/article145159745/Prorussische-Rebellen-warnen-vor-grossem-Krieg.html>

Ankaŭ lau la brita pensfabriko European Leadership Network (ELN) Ruslando kaj NATO pretigas sin al grandskala milito.

<http://de.sputniknews.com/militar/20150813/303782912.html>

Ci tiuj novajhoj estas ne nur maltrankviligaj sed ankaŭ giganta skandalo. Antau ol la "granda milito" eksplodos, estus pli bone forigi la Putin-reghimon, kiu farighas pli kaj pli agresema, kaj anstataŭigi ghin per pli paca registaro. Car tian "grandan militon" ankaŭ la rusoj ne povos gajni. Se nukleaj armiloj estos aplikataj, tia milito eble estos la plej lasta "granda milito" en la historio de la homaro.

Mi konstatas, ke la respondecoj de la retujo reu.ru ne bonvolis reagi al mia propono interligi sian paghon kun jena kontribuajho http://www.planlingvoj.ch/Tataroj_de_Krimeo.pdf

Anstataŭ tio ili preferas atentigi pri stranga komento de iu (orient)germana kuriozulo, kiu komplete mise kaj stulte prezentis, klarigis kaj interpretis la "Krimean problemon", pri kiu li laŭ mia opinio nenion komprenas, same kiel li nenion komprenas pri la aktuala situacio de Ruslando entute. Per tiaj publikigoj oni komplete ridindigas sin mem, subfosas kaj diskreditas la propran seriozecon, verŝajne eĉ en Rusio mem (kie la politika ciniko plene regas la landon kaj kie kelkaj esperantistoj kredas, ke ili devas leki la pugon de la registaro, kiu ŝtelis Krimeon de Ukrainio, al kiu ĝi apartenis, lanĉis agresan militon kontraŭ Ukrainio kaj havas malamikajn intencojn kontraŭ aliaj najbaraj ŝtatoj, kiujn ĝi verŝajne volas rekonkeri). (Oni ne devas aparte substreki la fakton, ke esperantistoj, kiuj subtenas tian politikon, ne apogas la pacon sed la militon, pro kio oni devas konsideris ilin komplete frenezaj.)

Ankaŭ "La Balta Ondo" preferas reprodukti groteskajn komentojn de Esperanto-stranguloj, kiuj asertas, por fari sin gravaj, ke ĉe ili "krimea problemo ne ekzistas" ktp. Mi alvokas la esperantistaron, precipe la junularon, komplete malfidi, malrespekti kaj ignori tiajn fushajn komentojn.

Oni devas konstati, ke ĉiuj tiuj esperantistoj devas esti same frenezaj. Do, anstataŭ permesi al tiuj stranguloj publike esprimi sian fushan opinionon, oni devus sendi ilin al la fermita sekcio de psikiatria kliniko, kie ili devus resti enŝlosataj dumvive, ĉar mi konstatas de jaroj, ke ili suferas la saman malsanon, kiu evidente ne estas kuracebla.

Al la responsuloj de la retujoj reu.ru, Balta Ondo kaj esperantio.net oni devas riproci, ke ili disvastigas stultajn informojn kaj senutilan propagandon. Ĉi tiu propagando estas eĉ danĝera por naivaj homoj, da kiuj en la Esperanto-movado kiel konate ekzistas ne malmultaj.

Ĉar mia aliro al la diskutejoj de Balta Ondo daŭre estas blokata, mi estas devigata dissendi ĉi-mesaghojn alimaniere tra la reto.

S. S. 36 http://planlingvoj.ch/Esperanto_adacta_Bericht2015.pdf

- Saluton al ĉiuj,

antaŭ unu monato, ni lanĉis vokon sur la retejo Edukado. net (kaj poste ankaŭ en aliaj lokoj) por trovi kurso-gvidantojn pretajn testi la materialon, kiun ni verkas por estonta internacia libro. Venis multaj kuraĝigaj reagoj pri ĉi tiu projekto, kaj mi volas pro ili danki vin ĉiujn!

Kiam, komence de Aŭgusto, ni ekredaktis la libron, ni estis tre ambiciaj kaj esperis, ke ni povos liveradi, iom post iom: lecionojn, registraĵojn, ekzercarojn kaj gvidlibron. Ni fiksitis al ni la celon eldoni la definitivan materialon en somero 2016. Tamen, en la pasintaj semajnoj trafis nin diversaj obstakloj kaj pli kaj pli evidentiĝis, ke ni mistaksis la grandon de nia tasko. Ni jam tre malfruiĝis kaj ni nun devas konfesi, ke ni ne sukcesos elteni la ritmon sendadi la materialon ĝustatempe por viaj kursoj. Tio tro premus nin kaj postulus de ni tempon, kiu ne estas je nia dispono. Cetere, ni ne volas fuŝi la kvaliton de la testota materialo pro manko da tempo.

Ni kompreneble ne forlasas nian projekton: ni nur devas redifini niajn celojn kaj kalendaron. Kvankam ne eblos testigi de vi la tuton, ni povos sendi al vi la unuajn du lecionojn, kiujn la ilustristo estas nun prilaboranta. Vi multege helpas, legante, komentante, kaj eventuale testante ilin en via kurso. Tiu unua provo certe jam evidentigos mankojn, kiujn ni povos jam eviti por la cetera redaktado.

Ni baldaŭ kreos retforumon speciale pri la testado de la lernolibro, kaj por regule informi vin pri la progresado de la projekto. Vi ricevos invitilon por aliĝi al tiu forumo.

La 1-an de Oktobro, vi ricevos la unuajn du lecionojn kaj ties ekzercarojn. Vi ricevos ankaŭ tri dokumentojn:

- konsilojn kaj instrukciojn pri la uzado de la materialo,
- demandaron per kiuj vi povos doni al ni kelkajn informojn pri via kurso kaj lernantoj
- demandaron per kiuj vi povos informi nin pri la testado, kaj pri viaj rimarkoj, sugestoj, ktp...

En Junio 2016, ni eldonos etan kvanton da libroj pretaj por kompleta testado ekde Septembro ĝis Junio 2017. Tiam ankaŭ estos preta retejo kun elŝutebla krommaterialo. La unua definitiva eldono de la libro estas nun planita por la somero 2017.

Refoje, ni dankas vin pro via intereso pri la projekto. Ni esperas, ke malgraŭ tiu prokrasto, vi daŭre volos proponi vian helpon!

Amike,
Kristof kaj Marion

Artikoloj

Fatbardha Demi



Pri la origino de la nomo Shqipetar

La esploranto pri filologio, ekskludante korologion, etnografion, historion de la religioj, psikologion kaj mem mitologion, neniam eniros en la tre pratempa Preĝejo de la Vorto
Giuseppe Catapano

La problemo, eble plej malfacila por la scienco de la historio estas la malkovro de la origino de la nomoj de la popoloj. La kialo estas ke la nomo, kiel la nuntempa ADN, rilevas la devenon, la aĝon de la ekzistado kaj tion kion jam estas heredita de la antaŭuloj. Pro aparta graveco de la nomo, ni komencos ĉi materialon ĝuste per la demando:

De kie venas la nomo Shqipetar?

Unuafoje, ĉi demando estas starigita de la fremdaj esploristoj. Surbaze de la konoj pri la historio kaj tradicio de la albanoj, dum la lastaj du jarcentoj, evidentiĝis du ĉefaj tezoj:

- 1- Ĝi devenas de la lingvo parolata de albanoj
- 2- Ĝi devenas de la nomo de aglino, sur la blazono de Skanderbeg kaj la militoj dum XV jc kontraŭ Osmanan Imperion.

Ĉerpante la devenon de la nomo "shqipetar" de la adverbo "mi klare prononcas" (en la albana: shqiptoj qartë). Unuafoje tiun konkludon ni trovas ĉe L. Benlou (Louis Beonlew " La Grèce avant les Grecs", 1877), kiu influite de J. Xylander (Joseph Carl August Anton Aloys Ritter und edler von Xylander, 1794-1854) asertas ke la vorto "shqiptar" similas al la vorto "shqiptoj". Sed li baldaŭ forlasas ĉi teorion ĉar tio ne estis tre kredebla. (1)

G. Weigand, atestas ke "shqip" signifas 'mi parolas klare, kompreneble'. Ankaŭ la geografo Eugen Oberhummer (1859-1944) kaj la austra albanologo Hahn samopinias. La germano Gustav Meyer, la devenon de la vorto trovas ĉe la latina vorto "excipre"- mi komprenas, ideo akceptita ankaŭ de Jeriček ("Die Balkanvölker" 1917, f330) (2).

Ankaŭ nuntempe, pri la nomo de la albanoj en la eldonaĵoj de la esploristoj kaj en la fremdaj enciklopedioj, tiu tezo restas. (3)

Same, kelkaj albanaj esploristoj, influite de fremdaj albanologoj, konsentas je ĉi tia deveno de la nomo. Kristo Frashëri asertas ke : La nova apelacio naskiĝis de la vorto 'shqip', kiun ni renkontas ĉe Buzuku, "shqiptar", tiu parolanta shqip-e, albane, tiu komprenanta la shqip-an lingvon, la albanan lingvon. (4)

Xhevat Lloshi: la novaj nomumoj pri la lingvo, loĝantoj kaj la patrio de la albanoj, estas formitaj surbaze de la adverbo 'shqip': shqip, gjuha shqipe, shqiptar, Shqipëri. (5)

Bardhyl Demiraj (*Shqiptar dhe shqip. Histori popujsh përmes dy emrave etnikë*): Je senca aspekto la verbo 'shqipoj' aŭ pli ĝuste 'shqiptoj', kiel ĝi troviĝas hodiaŭ vaste uzata en la paroloj de la albano, inice havis la signifon : mi komprenas, mi konas", kiel tion donas Hahn kaj Meyer. ka. (6)

Sed ekzistas ankaŭ "sciencaj" asertoj ke: "La esploristo prave sin forigas de la romantikaj kaj grandiozaj formoj de la ekspliko de la etnonimia nomo de albanoj per signo, kiu ne estis iamtempe totemo de albanoj, Shqiponjës- AGLINO, aŭ de la mallonga formo, shqipes. (7)

Laŭ la supre dirite, rezultiĝas ke: nia popolo sin nomis Shqipetar, ĉar ties membroj parolis klare unu kun la alia kaj komprenis sian lingvon. Nature naskiĝas la demando: kaj la aliaj popoloj, bone komprenis unu la alian kaj sian lingvon, kial do la albanoj impresiĝis dum Mezepoko, kiam dokumentiĝas la nomo Shqipetar, ĝis tiu skalo ke ili memnomiĝis kiel loĝantoj, kiuj "interkompreniĝis" kaj forlasis la miljarajn nomojn de siaj praavoj?

Se ni prikonsideras la unuajn skribajn dokumentojn, ni rimarkas ke la lingvoj ne havis nomumojn, sed difiniĝis en lingvoj "tutsamaj" de certaj gentoj kaj "diversaj" (barbaraj) de fremdaj gentoj.

En la skriboj de Tit Livi ni legas ke: Aetoles, Acarnanes, Macedones, "ĉiuj tri popoloj parolis *la saman lingvon...*" (8).

La popoloj kaj la gentoj parolintaj la saman lingvon, sin konsideris gentoj je sama etneco.

En dokumento de Aleksandro la Granda, malkovrite de Lucia Nadin (La muzeo Correr, Venecio), oni skribas: "Mi Aleksandro, la filo de Filipo, reĝo de makedonoj, (...) posteulo de la distingita Semo de Iliraj popoloj de Dalmacio kaj Liburnio kaj de la aliaj popoloj de la sama lingvo, loĝigantaj Danubon kaj la centran areon de Trako..." (9)

Dum la pli postaj periodoj, la lingvoj nomumiĝis laŭ la nomoj de la popoloj, parolintaj ĝin kaj neniam okazis la kontraŭo, kiel asertas la studentoj de la unua tezo. Do, la nomumo de la Nacio de albanoj ne devenas de la lingvo parolita, sed de aliaj esencaj faktoroj.

La popola Kredo- asertas Dhimitër Pilika- ĉie en la albanaj teritorioj honorigas la aglinon kiel ion sanktan, ne tuŝeblan (...). Tion ni trovas je natura formo aŭ stiligite: sur ligno (kestoj, ŝrankoj, plafonoj, luliloj, kuleroj, ŝpinbastono, ka); sur metalo (ponardo, glavo, hejmaj ujoj, geviraj ornamaĵoj, fusiloj ka); sur tekstilo kaj ledo (mokasenoj, rimenoj, popolaj kostumoj, ŝtrumpoj, kurtenoj, tapiŝoj ka); sur ŝtono (lintelo, kamenoj, sidŝtono). (10)

Sed ankaŭ en la kanzonoj, rondancoj, homnomoj, toponimoj kaj kiel la ĉefan simbolon de la nia Nacio kaj Ŝtato.

Nature naskiĝas la demando: kial, disfalinta tezo el XIX jc, stariĝas en la XXI jc?

La dua tezo konsideras la originon de la nomo de la nia Nacio origine de la nomo de la aglino-shqiponja. Tiu opinio akceptatas de plimulto de esploristoj kaj de ĉiuj albanparolantoj.

Por ne plilongigi, mi envicigas kelkajn aŭtorojn de ĉi tiu tezo. Laŭ Maksimilian Lambertz, (...) la nomo devenas de "shqiponja- la aglino", kiel nomo de totemo ekde la tempo de Skanderbeg kaj estas ia esprimaĵo de la nacieco. (11)

Mehdi Frashëri (*Historia e lashtë e Shqiperisë dhe e Shqipëtarëve*): "Çar Skanderbeg en sia flago havis la aglinon- shqipe-n, tiuj kiuj sekvis tiun flagon, nomiĝis albanoj". (12)

Eqerem Çabej (*Shqiptarët midis Perëndimit dhe Lindjes*) : La albanoj nomiĝas tiel sekve de aglino... (13) ka.

Sed la reprezentantoj de ambaŭ tezoj, opinias ke la nomo Shqipëtar apartenas al la periodo de Mezepoko. Dhimitër Shuteriqi: unuafoje, "shqipëtar", kiel popola nomo, komencanta anstataŭi la nomon "arbër", renkontiĝas ĉe "Concilio provinciali" (albana eldono 1706, 105), "La Kunveno de Arbër"; tie oni parolas pri la lingvo de "shqipëtar-oj", en la originalo, de "schippetarevet". Dum la nomon de la lando 'Shqipëri' ni trovas unuafoje je la fino de XVIII, en la buŝo de la Kolonja popola poeto, Hasan Zyko Kamberi. (14)

Tia konvinko baziĝas en tio ke ĉi nomo ne mencias pri kelkio gento aŭ loko en la dokumentoj de la periodo greko-romana kaj ke "Arbëreŝoj de Italio kaj Grekio ne konas la nomon shqipëtar, kaj tio montras ke tiu nomo ne ekdomantis en Albanio je la fino de Mezepoko". (E. Çabej « *Shqiptarët midis Perëndimit dhe Lindjes* ») (15)

Tiu ideo dominantas ankaŭ ĉe la fremdaj aŭtoroj. En la Tria Internacia Kongreso pri Bizancaj Studoj (Ateno, 1930), Petros A. Furiqis (La deveno de la etnonomo Arvanit), asertas ke "Ilirio (...), verŝajne ĉirkaŭ X jc, nomiĝis Albanio kaj post XIV jc nomiĝis Shqipëria. (16)

Nathalie Clayer (Centre d'Etudes Turques, Ottomanes, Balkanique et Cetralsiatique, de France) asertas ke "La nomo Shqipëri estas pli malfrua, estas evoluinta nur post XV jc. (17)

Tia konkludo jam "stampita" far de la historia scienco, instigis kelkajn eŭropajn esploristojn arhivigi la dosieron pri la origino kaj praeco de la nia Nacio, en la tirkesto de la "nesolvitaj aferoj".

Fallmerajer: "Dum la malnova erao nenie oni mencias la shqipëtaran nacion, nek ilian patrimon. La origino de ĉi tiu popolo same kiel la naturo de lia lingvo ege diskuteblas" (18).

Oni starigas la demandon: Ĉu estas dependita la agnosko de la historia fakto, nur se troviĝas aŭ ne, ĝi en dokumento skribita? Tiu kriterio estis valida, antaŭ du-tri jarcentoj, kiam ankoraŭ ne naskiĝis la aliaj esploraj sciencoj kiel lingvistiko, arkeologio, popola tradicio kaj oni ne prikonsideris la logikan analizon ka.

La solaj, asertintaj la kontraŭon, estis ja la Renesanculoj de la fino de XIX jc, Sami kaj Naim Frashëri, Pashko Vasa ka, kiuj substrekis ke La Nomo Shqipëtar estas tre Malnova. Kaj la historia vero? Por malkovri la praecon de iu nomo, oni devas pruvi la egalajon "nomo = mitika simbolo".

Shqiponja, la plej grava simbolo antaŭhistoria de Dio

Simboleca figuro, asertas la psikologo Karl Jang (Carl jang), estas tio, kiam ĝi entenas ion, kio reprezentas pli ol la ties senperan aspekton, tion vidata de ni. (19)

Do la simbolo de aglino ne devas kompreniĝi simple kiel monta birdo kaj sekve ĝi esprimas shqipëtarojn loĝantajn en la montara regiono, kiel oni opinias ne rare.

Laŭ la lingvisto Petro Zhei, "Ĉiuj simbolecaj figuroj, tiomtempe kiom ni restas en la reala, materia Mondo, estas kaŝitaj, okultitaj, enkavigitaj, malhelpitaj, malpermesitaj, nevideblaj..." (20)

Por kompreni la simbolojn, ni devas koni la kredon de la ties kreintoj kaj tion kion ili deziris esprimi per ili. La unua paŝo ĉidirekte estas la agnosko de la fakto ke :

a) Pelazgoj- dardanoj estis la kreintoj de la mitoj de la antaŭhistoria Eŭropo, atingintaj de la pratempaj aŭtoroj.

b) El la mondo de la vivaĵoj, la aglino estis la "rimedo" per kiu la primitiva homo "vidis" Dion.

La esploristo de la pratempa kredo, M. Eliade asertas ke " la birdo" estas unu el la aspektoj de la diina spirito kaj "en la mitoj, legendoj kaj ritoj rilatantaj al la diiniĝo en la ĉielo (il "volo magico") en ĉiuj kontinentoj, ekde Aŭstralio, Centra Ameriko ĝis la Arktaj Areoj, esprimiĝas per la flugiloj kaj plumoj de la aglino". (21)

La aglino estas unu el la plej praaĵ simboloj de la homo kaj la plej alta Dio de Druidoj. (22)

Ĉiuj plej potencaj dioj, en la mitoj kaj unuaj skulptaĵoj, en tre vasta spaco geografia, estas prezentitaj kiel aglinoj, duonaglinoj, kun la ties flugiloj aŭ kapo kaj estis lunecaj. (pli vaste, vidu F. Demi *Perëndesha më e fuqishme e të gjitha kohërave – në xhubletën e mirditores*, 2014).

Sur la subaj fotoj (de maldekstre) ni havas la lunecan Diinon Sellena de la templo de Dodono kun la albana lankapo; la reĝo Horos, surnomita la diino aglino (Hr), estis reĝo de la unua dinastio arĥaika egipta. Lia kulto honoratis aparte en la pratempa urbo Nekhen, kio en la kopta lingvo tradukiĝis kiel "la urbo de aglinoj"; emblemon de la Palaco de Darius I en Suse. La sfero supre kun aglinaj flugiloj (Dio), esprimas ke tiu reĝo ĝuas la diinan protekton. Du sfinksoj sube (kun la reĝaj kapoj, rigardantaj al kontraŭaj direktoj, kun aglinaj flugiloj kaj leona korpo) montras la senliman potencon de Darius I esprimante: Sur la Tero, mi estas Dio! (23)



Laŭ la fama historiisto de Aleksandrio, Filones, (jaro 30 antaŭ Kristo- jaro 45 post Kristo) en «*Quaestiones et Solutiones in Genesis* » en la pratempa kredo la Aglino- Shqiponja reprezentis "La Duan Dion kaj la ties Saĝecon" (24)

Tio eksplikas kial Zeŭso prezentiĝas ĉiam kune kun la aglino. ĝia figuro reprezentis la vivon, la morton kaj la resurekcion, karakterizaĵoj de la diina spirito. (fig. 1 sube) (25)



En la pelazga kredo de la pratempa Egiptio, la Diino- aglino (Dea Birdo de M. Gimbutas), esprimis "ba" (spiriton" kaj "sheut" (ombron" kiel du konsistigaj elementoj de la homo). La birdoj en la objektoj de la primitiva homo, rimarkigas la arkeologiino Maria Gimbutas, simbolizas la ideon ke la morto kaj la resurekcio estas rilatitaj malligeble. (26)

Tiun antaŭhistorian kredon ni trovas esprimite ankaŭ hodiaŭ en la folkloro de la albanoj. En regiona folkloreca festivalo, aĝulo el Mërtur de Guri (Pukë) prezentis rondancon, kie, per malfermitaj brakoj kaj tordante la tutan sian korpon, li esprimis la aglinon mortanta kaj denove resurekcia. La lokaj loĝantoj diris ke ĉi tiu rondancoj ludiĝis en la montaro (27).

La adorado de Shqiponja (Aglino), ĉe la albanoj estis heredita de la iliaj antaŭuloj, kiel tion atestas ankaŭ Eliani (De natura animalum, II, 140), kiu diras ke la fama Reĝo Pirro, kreskis en sia loĝejo kiel praavan simbolon, aglinon kiun li tenis ĉe si ankaŭ post la morto de la birdo. (28)

La adorado de la certaj simboloj de la kredo, dum la pratempo indikis pri la etna aparteneco de la gentoj. Atestaĵon de ĉi tiu historia fakto alportas Giuseppe Catapano: Kostandino la Granda (...) kaj ĉiuj aliaj imperiestroj de Ilirio, regintaj post li, sub la signo de Shqiponja- Aglino, estas ĉiuj Borealaj, "Filoj de la Lumo" (filoj de Dio- mia noto). (29)

La mitoj kaj la arkeologio, atestas ke la aglino servis kiel simbolo de la Kreinto. Sekve la nomo "shqipetar", kiu havas en la radiko sian religian nomon. La esploristo L. Poliakov skribas ke " Oni ne bezonas alporti pruvojn ke multaj popolaj nomoj malnovaj estas la samaj al la nomoj de iliaj naciaj dioj". (30)

Tion konfirmas ankaŭ Sami Frashëri (*Shqipëria ç'ka qenë, ç'është e ç'do të bëhet*, 1899): La tuta nacio akiris la nomon Shqipetar kaj nia lando, la nomon Shqipëri, vortoj faritaj de la albana benita birdo de Diino, al kiu preĝis niaj malnovaj gepatroj kaj kio enestas ankaŭ sur la flago. (31)

Ekde la "arto" de la homo de Paleolito, (*Il linguaggio della Dea M. Gimbutas*) kaj ĝis nuntempe, la aglino kune kun la kruco/stelo, (fig. 1, sube) restis ĉefa simbolo de la Kreinto, en arto, en la konstruaĵoj (preĝejoj, moskeoj) kaj la vestoj de la plej altaj religiaj figuroj. (fig. 2) (32)



Monero el la romia periodo jaro 209 post Kristo; la aglino ĉe Lia sankteco, Chrysostomos II, prelato de la preĝejo de Kiprio, la plej pratempa kristana religia komunumo post Jeruzalemo; "Al la Vera Kruco", la ĉambro de relikvaĵoj de la hebrea Preĝejo, Jeruzalemo; Dukapa aglino en la moskeo de Divrigi (Turkujo).

Ankaŭ en la ĉiutaga vivo (en la popola tradicio) kaj en tiu administracia, ŝi okupis centran lokon. En la reĝlandoj iliro-epiraj estas tranĉitaj pli ol 72 serioj de metalaj moneroj, milionoj da moneroj kun la simbolo de aglino, produktitaj en Foenike, Oriki, Bylis, Apolonio, Durraho, Korkyra, Kasopa, Leukada, Akarnania *historiaj albanan teritorioj) ka (foto supre) (33)

Prikonsiderante la fakton ke:

- 1- La aglino estas la plej grava simbolo de la primitiva homa kredo;
- 2- Ke la antaŭuloj de albanoj (pelazgo-ailiroj) enviciĝas inter la plej pratempaj loĝantoj kaj apartenas al la unua kredo de la antaŭhistoria Eŭropo.
- 3- Ke la albana lingvo, nomumiĝas de esploristoj kiel natura lingvo, tio estas kreita ne de io alia sed ekde la tempo kiam la homo startis paroli.

Do estas eksterlogike pensi ke la nomumo shqipetar apartenas al la periodo de Mezepoko kaj mankas en la skriboj de la unuaj historiistoj de la Pratempe. Tiun konkludon pruvas ankaŭ la nomo Epirote kaj Epir, pri la lingvo, popolo kaj lando de la albana etnio.

La esploristo Petro Zhei (Shqipja dhe Sanskritishtja) asertas ke : "La simbolo 0 estas tiu de la centro, de la Animo, de Dio" (42)

La nomo AIN troviĝas kiel toponimo en la Proksima Azio, kiel 'Ain Zāra en Tripolitania', 'Ain Giālūt' en Palestino.

AIN nomiĝis ankaŭ la urbo Levit en la teritorioj de la pratempaj triboj Hebraikaj. Pri tio oni parolas en la Biblio (15:32 kaj 19:7) (43). La sama nomo, en Francio estas toponimo de vasta areo arkeologia de antaŭhistorio (la municipoj Belley, Pérouges, Bourg-en-Bresse dhe Trévoŭ), ka.

Per la toponimoj kaj samaj mitikaj simboloj, trovitaj en la geografiaj spacoj eksterordinare larĝaj kaj eksplikataj per la sama lingvo kaj kredo (kiel nia okazo), ni povas difini la disvastiĝon de la gentoj kaj la pelazga kredo, dum la antaŭhistoriaj periodoj. Tiun fakton pruvas la arkeologiaj objektoj. En la arto de la Aztekaj popoloj de Ameriko, vico de okuloj estas gravurita supre de la stiligita aglino.

(fig. 1). Ankaŭ en la piramidoj egiptaj (fig. 2), la granda okulo staras supre de la aglino centre, esprimante la saman miton: "La aglino estas la Dia okulo". (44)



Ni lasu portempe la nomumon de la aglino en la lingvaĵo arbreŝa AIN kaj nin koncentru ĉe la ĉefa temo: La malkovro de la origino de la nomo Shqipetar kaj la ties malnoveco.

Laŭ G. Catapano, en la origino de la homaro, la formiĝo de la nomo konsideriĝis kiel sankta arto t. e. religieca. Kun la evoluo de la primitiva socio, al la originala nomo de la aglino IPE, aliĝis aliaj vortoj, esprimante lingvece, la diversiĝon kaj riĉiĝon de la mitoj de la pelazga kredo. La nomon Shqipetar (Schipetar, ka en la dokumentoj) kiel senelementa nomo, ni povas redoni en la pratempa formo: Sch + ipe+ t' (të) +ar.

En la senco pelazgokreda, ĉi tiu frazo legiĝas: La vorto/ Kreiva Animo de Dio Lumo.

La sekvita vojo: Sch = skep/ beko (ch latina, antaŭ la vokaloj legiĝas en la albana -k) kaj la lango eligita eksteren videble, ĉe la aglino en nia flago, esprimas la manieron kiel Dio kreis la Mondon per la Vorto/ Kreiva Animo + de Dio (reprezentata de la vorto "ipe"- aglino) + t'Ar-it. Ĉi lasta, ne estas finaĵo, sed vorto-radiko tre praa, kiu troviĝas ankaŭ komence de la nomo Arbër / Arban kiel nomumo de Dio (Stelo).

Tion atestas Petro Zhei: Alia maniero je referiĝo al la Centro (Dio- mia noto) estas ankaŭ ĉi tio: la libera operatoro (pura radiko) AR en vico de lingvoj esprimas "luman principon" (45) por atesti pri la rilato aŭ origino de Dio.

Oni devas akcentigi ke la sekvita vojo en la studado, ne baziĝas simple en supozado, sed en la "spuroj" hereditaj en la pli postaj kredoj kaj en la arkeologiaj objektoj. Laŭ la Nova Testamento:

"Komence estis la Vorto kaj la Vorto estis Dio (...), ĉiuj aĵoj fariĝis de Li..." (Giovanni 1, 1-4) (47)

Kiel sciite, la edukiĝo de la popolo fariĝis amasa fenomeno nur du-tri lastajn jarcentojn, t. e. dum la XIX-XX jc. Sekve, la mitikaj simboloj, helpe de la arto (primitivaj gravuraĵoj, desegnaĵoj sur koraj ujoj, skulptaĵoj surmetale, ŝtono kaj mramoro, muraj pentraĵoj ka) ekde la tempo de Paleolito ĝis la modernaj tempoj, estas ludintaj la ĉefan rolon por disvastigi kaj eternigi la kredon kaj la mitojn. Ĉi tiu fakto atestiĝas en la multaj arkeologiaj objektoj, konstruaj kaj artismaj laboroj kiuj ĝisatingis nin. Por esprimi nemateriajn fenomenojn, kiel estas "la vorto" aŭ "la animo" per kiu Dio kreis la mondon kaj la ties loĝantojn, la pratempa "artista" uzis la logikon. Li esprimis la mitikan penson, prezentante la organon de la homo produktanta la vorton kaj eliganta forte la animon: la malfermitan buŝon maksimume kaj la eligitan langon eksteren videble (fig. 1, 2, 3 sube).

En la vortaro de la Malnova Testamento oni skribas: La lingvo, estas simbolo por la parolado. (48)



(49) (de maldekstre) La kalendaro de Aztekoj; La etruska arto; la Dio Bes (La templo de Denera, Egiptio).

Laŭ la esploristoj, Dio Bes ĉeestis en la ĉiuj periodoj de la pratempa egipta kredo.

Ĝis la tempo de Faraono Akhenaton (Dinastio XVIII, jaro 1350 antaŭ Kristo) estas prezentita kun la flugiloj de la aglino; la emblemo de la familio de Kastriotoj en Mezepoko, kun la aglino kaj la stelo sur la ties kapoj; la hodiaŭa flago de la Nacio kaj Ŝtato Albana.

Tiu inventaĵo de la primitiva homo, por respugli ĉi tiun miton de la kredo, estas nekonata de esploristoj de la arkeologio kaj historiistoj, sed tion ni trovas esprimite en la mirinda arbresa kanzono dediĉita al la Aglino. Tiu kanzono estas kolektita en Helado (Grekio) de la arbresa pastro, Patro Anton Belushi (*Ricerche e studi tra gli arbërori dell'Ellade da radici arbëreshe in Italia a matrici arberorë in Grecia*):

Bona Patrino kaj Diino/ kiu forte amas vin/ nin mizerulojn ne nforgesu/ kaj tenu nin zorge;
Mëmë e mirë e Perëndeshë/ ç'akjë do kë fort të do/ neve t'mjerët mos harro/ edhe mbajna në kujdes;

Kiom longe ni vivos sub via ombro/ kreita de la beko (animo-parolo) / prikantante nian landon/ ĝoje kaj fidele (50)

Sa të rrojëm nën hjes tënde/ e nga skjepi të pështruarë/ veldit t'onë tue kënduar/ me gëzim edhe me besë.

Apoge al ĉi tiu kanzono kaj mito, mi alportas alian atestaĵon. La albanoj de Iperio (Epiro), ilian lingvon nomas "la lingvo de Dio" (de Ipe/ Aglino). En letero de Panajot Kupetori, sendita al Karl Reinhold, je 25an de Sankta Dimitro 1857 (25. 10. 1857) skribis "Vi pasigu bone kaj sane! Hieraŭ mi ricevis leteron de via moŝto, kaj ege ĝojiĝis, ke vi rememoris pri mi kaj alskribis min ankaŭ en la birda lingvo, kiel oni diras ĉe ni Arbreŝoj... (51)

En la fino de ĉi tiu lingva, mitika kaj tradicia vojaĝo, ni rajtas aserti ke: La pratempaj gentoj pelazgaj sin nomis "iperotoj" kaj poste "shqipetaroj" dum la pratempo, inice de la kredema simbolo pri la Aglino, por montri ilian originon de Dio, t. e. "Ni estas Diaj filoj". Tiun kredeman originon de la loĝantoj, estas elmontrintaj la fremdaj esploristoj el XIX jc en siaj libroj: Albanoj sin nomas "filoj de la aglino" (52). Laŭ Andre Leroi- Gourhan, (*Le Gente et la Parole*): La genealogia mito estas la unua formo de la historia reflektiĝo. Tiel la membroj de homa grupo "devenas" de diino, de heroo aŭ de besto. (53)

Koncerne la supre menciiton, la pratempa nomo de la nia Nacio- Shqipetar- laŭ la pelazga kredo, esprimas La Miton pri la Kreado, de la Vorto/ Dia Animo- Lumo (kiel estas dirite ankaŭ en la Biblio).

Ĉi tiun fakton atestas ankaŭ la mitoj: Iperione (Shqiponjë- Aglino) prezentiĝas kiel kreinto de la naturo: Luno, Suno kaj Aŭroro (la Luna, il Sole, l'Aurora ; Hesiodo, *Theog*, 371; Diodoro V, 66 (54).

La prezentado de la nomo de la aglino kiel maskla figuro, montras la diferencon inter la mitoj en la periodo de patriarkato. En la mitoj pli postaj, la aglino konsideriĝas kiel praavino de Adam, el kiu devenas la homoj loĝigintaj la Mondon. Ĉi tiu mito konatiĝas ankaŭ en la Mezepoko. (55)


Laŭ la aliaj aŭtoroj (Hygin, *Fables* ; Pausanias, *Description de la Grèce*.) Iperone estas la patro de Titanoj (56). (Titanoj estis pelazgoj). Ni retrovas, kiel kreintoj de la homa raso, en la mito de Deukaliono kaj Pirre, kies nomo (kiel ni vidos tion en la dua parto), signifas aglino. Ĉi tiu nomo uzatas ankaŭ hodiaŭ nur ĉe albanoj, sed en la maskla ĝenro- Pirro kaj konserviĝas en sia originala nomo ĉe la ina ĝenro- Shqipe (aglino).

Tiu legendo estis konata en la Pelazgia Duoninsulo (Balkanio), aparte en Epiro en la areo de Tesalio (57). Dum la periodo de Kristanismo, malaperas la nomo de aglino kaj ĉiuj popoloj de la tero devenas el tri filoj de Noa (Sem, kam kaj iafet), Genesi X 1-32.

Ĉiuj nomumoj konataj historie pri la albanoj kaj iliaj antaŭuloj Pelazgo-Iliroj, rilatas al la mito de Kreado: pelazg- naskita el la tero (agrokampo); Ar + ban/ Ar + bër: farita el Ar- a/ la tero; Ilir ?Yll-ir esprimas la originon el Dio/ Yll- Stelo. Ylli- la Stelo= la Diina Lumo. (58)

Al +ban / Al +ba(ë)ri (la titolo de la ĵurnalo de la arbriŝoj/ Italio, (figuro sube) : faritaj de Al kie Al aŭ El (eb) en la esotera vortaro tradukiĝas kiel Dio. (59)

La nomon de Dio, Al kaj de la aglino AIN, ni trovas kiel toponimo de la kvarmiljara urbo en la Unuiĝintaj Emirlandoj: Al- 'Ayn (____), kio skribiĝas ankaŭ Al- Ainm en la kredema senco signifas "Dio- Aglino". (60)



La unua konkludo: la nomo Shqipetar estas pratempa kaj speguligas la evoluon de la unua kredo de la mediteranea spaco, tiu Pelazga kaj estas nomo religia. Ĝia origino fontas de la antaŭhistoria IPE, kio esprimas lingvistike la simbolon de la Kreintop la Aglino. Tiu nomumo, heredita ĉe la hodiaŭaj albanoj, esprimas la Miton pri la Kreado de la homo, fakto provebla ankaŭ de la aliaj historiaj nomumoj de la nia Nacio: Pelazgo- Arbër- Ilir / Yllir- Alban, konataj en la ĉiuj niaj naciaj loĝareoj, kiel nomumoj de la sama etnio. La nomo de la aglino en la albana lingvo estas nekontestebla dokumento pri la aŭtoktoneco kaj origino pelazgo-ilira de nia Nacio kaj de nia lingvo. La vojo de ĝia formiĝado en la albana lingvo, atestas ke en la inico de la homa historio, la nomumo konsideriĝis kiel sankta arto, kie la Kredo kaj la Lingvo, estas esprimintaj kaj perfektigintaj unu la alian.

Post kiam ni klopodiĝis malkovri per la lingvo, kredo, mitoj, arkeologio kaj tradicio de la nia Nacio, la originon de la nomo Shqipetar, mi opinias ke la materialo estus malsufiĉa, se ni ne menciis la gravecon de la protekto de la albana lingvo kaj aparte de ties dialektoj, pro la mistraktado al ĝia vortaro flanke de elektotronika medio, intelektularo, lingvistoj kaj eldonistoj de la lernolibroj (sen ĝeneralizi tion).

Prave, la esploristino Mirela M. Sinani starigas la demandon: La afero estas ke la sonoj kaj la silaboj fundamentaj portantaj la senco-radikon de la vorto, devas resti netuŝitaj... Ĉu ni forĵetu la trezoron de la viva lingvo, ĉar tiel estas decidintaj iam kelkaj lingvistoj?

Kiel ni povus pretendi pri la praeco de nia lingvo, kiam ni demetas la rilatojn kun la plej malnovaj lingvistikaj elementoj? (61)

Tio ja okazis ankaŭ al la nomo de la nia popolo, kiu ĝis la komenciĝo de la XX jc skribiĝis Shqipetar.



Ĵurnalo de la albanoj en Buĥaresto, 1889. (62)

Hodiaŭ ĝi skribiĝas Shqiptar, pravigite ĉar tiel elparolas tion la popolo. La demeto de la vokalo 'e', alportis la deformiĝon de la praa radiko 'ipe'.

Estas sciite ke en la ĉiutaga parolado la popolo, ne nur 'manĝas' la vokalojn aŭ konsonantojn, sed ankaŭ ŝanĝas la ties lokojn aŭ forlasas ilin. Tia konata fenomeno, laŭlonge de la historia vojaĝo de la homaro, alportis la kreiĝon de la dialektoj ĉe la gentoj je sama etnio, ĝis la formiĝo eĉ te novaj lingvoj, kiuj hodiaŭ difiniĝas kiel lingvofamilioj ekz la neolatinaj lingvoj. Kiam kreiĝis la standardaj lingvoj (XIX- XX jc), la radikoj de la vortoj, en la skribado "protektiĝis" de la deformigoj de la popola lingvo.

Nu, kial en la ortografio de la hodiaŭaj tagoj, devus malaperi la ĉefa radiko de la nomo Shqipetar? Sekve kune kun la radiko 'ipe', perdiĝis la origino kaj ka mitika senco (de la Kreinto- Shqiponja, aglino) de la nomo de nia popolo, malfermante la vojon al la disfalinta kaj antiscienca tezo de XIX jc: "shqiptoj qartë- mi prononcas klare". Bonŝance, la nomo de la lando- Shqipëri, konservis la literon 'ë' kaj la ties antaŭhistorian radikon.

Sed la "muzeo" de la nia lingvo, pri la nomo Iperi/ Shqipëri, ankoraŭ ne elmontris ĝiajn trezorojn..

Fatbardha Demi (fatbardha_demi@yahoo.com)
26. 06. 2015

Bibliografio

- 1- "<http://eltonvarfishqip.blogspot.fr/2010/02/etimologjia-e-emrit-shqiperi-shqiptar.html>"
- 2- Eqerem Çabei «Shqiptaret midis Perendimit dhe Lindjes» Botime Çabei, Tirane, 2002 f17
- 3- Ne Enciklopedine hungareze: «Jezik-... Domaći naziv za jezik (shqip: albanski, gjuha shqipe: albanski jezik) vrlo je vjerojatno u vezi s pridjevom/prilogom shqip: jasan, jasno, i glagolom shqiptoj: govoriti razgovijetno, razumljivo»
<http://www.enciklopedija.hr/Natuknica.aspx?ID=HYPERLINK>
"http://www.enciklopedija.hr/Natuknica.aspx?ID=1364"1364
- 4- Kristo Frashëri «Si u krijua emri etnik i shqiptarëve», 9 Shtator 2013, Shqiptarja
<http://www.peshkupauje.com/2013/09/si-u-krijua-emri-etnik-i-shqiptareve>
- 5- Xhevat Lloshi Periudhat historike te SHQIPES... LOGOS A, Shkup 2013
- 6- Bardhyl Demirajt "Shqiptar dhe shqa. Histori popujsh përmes dy emrave etnikë", Shtëpia botuese Naimi
<http://botasot.info/speciale/335335/studimi-ja-pse-na-quajne-shqiptare-dhe-pse-i-quajme-shkije/>
- 7- Si u bënë „Albanët-Shqiptarë“ Prof. dr. Shaban Sinani, Tiranë, 02. 03. 2010)
- 8- Dr. Johan George von Hahn "Studime shqiptare" (Albanesische studien, Jena 1854), Bot shqip

nga Instituti i Dialogut & Komunikimit, f351

9-illyriapress/http://www. ilirida-online. com/histori-dhe-studime/testamenti-aleksandrit-te-madh-une-jam-ilir/

10- Dhimiter Pilika « Pellazget Origjina jone e mohuar » botimet enciklopedike, Tirane 2005 f81-82

11- Aristotel Mici Prejardhja e Emrit Shqiptar <http://tribunashqiptare.net/?p=12157>

12- Mehdi Frasheri (1872-1963)« Historia e lashte e Shqiperise dhe e Shqiptareve » Plejad, f 69

13- Eqerem Çabei « Shqiptaret midis Perendimit dhe Lindjes » Botime Cabej, Tirane, 2002, f17-18

14-« Mbi disa çeshtje te Arbërit » (206-18), f33 Dhimiter S. Shyteriçi « Tekstet shqipe dhe shkrimi i shqipes ne vitet 879-1800 » Akademia e Shkencave e Shqiperise, Instituti i Gjuhesise dhe i Letersise, Tirane, 2005)

15- Eqerem Çabei « Shqiptaret midis Perendimit dhe Lindjes » Botime Çabei, Tirane, 2002, f11

16- Petros A. Furiqis (1878-1936) «Prejardhja e etnonimit arvanit » (ALBANOHELENIKA)

17- Nathalie Clayer “Shqiperia, Histori e shkurter”, 2014, Enciklopedia e Islamit (edicioni i trete) <https://shekullishqiptare.wordpress.com/2014/12/30/45/>

18- Spiro Konda, “Shqiptaret dhe Problemi Pellazgjik”, UEGEN, Tirane, 2011, f28

19- Carl Jang « L'uomo e i suoi simboli » TEA, Milano, 2011 f6

20- Petro Zhei “Shqipja dhe Sanskritishtja (pjesa e dyte)”, Tirane, Tertiumdatur, 2006, f79

21- Mircea Eliade « Storia delle credenze e delle idee religiose- Dall'eta della pietra ai misteri eleusini » BUR Saggi, 2013, f182

22- Helena P. Blavatsky, Colana Cintamani. Il Glossario Teosofico di Helena Petrovna Blavatsky, Roma

23-(1)

(http://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/thumb/4/43/Bronze_Nike_Louvre_Br1679.jpg/409px-Bronze_Nike_Louvre_Br1679.jpg)

(2) "Egypte Romaine, L'Autre Egypte" Marseille, musée d'Arceologie méditerranéenne, 1997

(3) <http://www.galerie.roi-president.com/displayimage.php?pid=816&fullsize=1>

24- Colana Cintamani. Il Glossario Teosofico di Helena Petrovna Blavatsky, Roma

25- <http://loasiditammuz.altervista.org/category/miti-e-simboli/>

26- Marija Gimbutas « Il linguaggio della Dea » VENEXA, Roma, 2008 f185

27- Jaho Brahaj “Flamuri i Kombit Shqiptar”2007, f23

28- Dhimiter Pilika f64 po aty

29-Xhuzepe Katapano (“Thot-Tat parlava albanese Bardi Editore, Roma, 1984)“THOT-i fliste shqip” Botimet Enciklopedike, 2007 f58

30- L. Poliakov „Miti Arian“, f7

31- <http://eltonvarfishqip.blogspot.com.es/2010/02/etimologjia-e-emrit-shqiperi-shqiptar.html>

32-(1) Aquila ad ali spiegate su fulmine a destra. Legenda: ROMA 209 a. C;(2) Barnaba Apostolo - Notizie in Liquida www.liquida.it;(3) Reliquary of the True Cross at the Church of the Holy Sepulchre, Jerusalem. http://en.wikipedia.org/wiki/True_Cross (4) Photo © Qantara. www.ledifice.net/S007-1.html

33- Dhimiter Pilika, f67 po aty

34- <http://www.dielli.net/pdf/historia/GjuhesiBallkanike.pdf>

35- Sami Frasheri, Vepra I (Tirane, 1989) shkrimi “Te dhena statistikore mbi Epirin” 29. 07. 1878 f146

- 36- Sami Frasherit GJUHA, (Stamboll 1886), Shkup 2002 f. 79
- 37-Dhimiter Pilika, f38 po aty
- 38- Xhuzepe Katapano, f81po aty
- 39- La cabala operativa di R. Ambelain Redazione di "Kether"Rassegna siciliana di studi Martinisti dell'OMAT – 1997 http://www.iltibetano.com/testi/martinismo_lingua%20ebraica.htm
- 40- Shqipja dhe Sanskritishtja (pjesa e dyte) Petro Zhei, Tirane, Tertiumdatum, 2006 f413.
- 41-<http://www.yeshuashemi.org/AlfabetoHebreo.html>
- 42- Petro Zhei, f77
- 43- http://www.fmboschetto.it/Utopiaucronia/Senza_Roma.htm
- 44- [http://www.dreamstime.com/royalty-free-stock-image-aztec-art-image10680186;](http://www.dreamstime.com/royalty-free-stock-image-aztec-art-image10680186)
http://www.fmboschetto.it/Utopiaucronia/Senza_Roma.htm48-;
- <http://www.cultorweb.com/Simbolismo/BC.html>
- 45- Petro Zhei f310 po aty
- 46- <http://www.treccani.it/enciclopedia/tag/ain/> ; [http://en.wikipedia.org/wiki/Ain_\(Bible\)](http://en.wikipedia.org/wiki/Ain_(Bible))
- 47- BIBLA – Dhjata e Vjeter dhe Dhjata e Re botuar nga Shoqata shqiptare e Bibles, 1995
- 48- BIBLA, f59 po aty
- 49-
<http://www.google.it/search?q=anima+nell'antichit%C3%A0&tbm=isch&tbo=u&source=univ&a=X&ei=OSgfUpSOLsvn7Abnw4HIDw&ved=0CH4QsAQ&biw=1024&bih=486>
(2) Art etrusk LO INVISIBLE EN EL ARTE:: TELQUINES Y CURETAS (Dáctilos y Coribantes), "SERVIDORES" DE BRITOMARTIS Y ANTECESORES DE MEDUSA. (De "Lo invisible en la mitología": Los bueyes de Gerión en el tesoro de El Carambolo. Parte LVIII). loinvisibleenelarte.blogspot.com (3)La religione dell'Antico Egitto www.aton-ra.com/.../religione-antico-egitto.h... - Italie -
- 50- Antonio Bellusci “Ricerche e studi tra gli arberori dell’Ellade da radici arbereshe in Italia a matrici arberore in Grecia” centro ricerche socio-culturali “G. Castriota” Cosenza 1994. f105
- 51- NETET PELLAZGJIKE te Karl Reinholdit, 1850-1860, K&B Tirane, 2005, f311
- 52- Dhimiter Kamarda, f103 po aty ; Eduard Shnaider « Pellazget dhe pasardhesit e tyre », Tirane 2009, f35
- 53- Andre Leroi-Gourhan, “Le Geste et la Parole”Paris, 1964 f9) L. Poliakov, Miti Arian
- 54-Enciclopedia Italiana (1933) di Alessandro Olivieri
http://www.treccani.it/enciclopedia/iperione_%28Enciclopedia-Italiana%29/
- 55- Hans Biderman “Enciclopedia dei Simboli” Garzanti 2014, f 43
- 56-(Hygin, Fables [détail des éditions] [(la) lire en ligne [archive]], LIII. ; Pausanias, Description de la Grèce [détail des éditions] [lire en ligne [archive]], II, 11, 5.)
http://fr.wikipedia.org/wiki/Hyp%C3%A9rion_%28mythologie%29
- 57- DEUCALIONE Enciclopedia Italiana (1931) di Nicola Terzaghi
http://www.treccani.it/enciclopedia/deucalione_%28Enciclopedia-Italiana%29/
- 58 - Ylli identifikohet, ne mendimin mistik, me Qendren (Zotin) P. Zhei f151 po aty
- 59- GLOSSARIO DE 58-“LA DOTTRINA SEGRETA”
<http://www.spiritual.it/it/glossario-de-la-dottrina-segreta/al-o-el,10,261>
- 60- <http://it.wikipedia.org/wiki/Al-%27Ayn>
- 61-Konferenca vjetore e shkences ‘Java e shkences’ 2012 Dr. Mirela (MITA) SINANI :
“Veshtrim filozofik per gjuhen shqipe. Rreth menyres se si norma gjuhesore e te shkruajturit mund te ndikojte ne humbjen e kuptimit te fjales »
<http://www.uni-pr.edu/getattachment/Kerkime-Shkencore/Ngjarje-dhe-aktivitete-kerkimore-shkencore/Libri-i-Kumtesat-perfundimtare-nga-Java-e-Shkences-2012.pdf.aspx>
- 62- Albanske novine koje su izlazile u Bukureštu 1889. <http://sh.wikipedia.org/wiki/Albanci>

Fino

Ni ne permesos al vi militi: Leĝpropono pri nacia sekureco kaŭzis manifestaciojn landskale en Japanio

[La originalo de ĉi tiu artikolo aperis en la 1a de septembro 2015.]

Dekoj da miloj da homoj denove kolektiĝis en la centro de Tokio la 30an de aŭgusto por protesti kontraŭ pridisputata leĝaro, kiu permesus al Japanio partopreni en militaj operacioj kun aliaj landoj kiel Usono.

La nova [leĝaro pri nacia sekureco](#), kiu povas esti kontraŭkonstitucia en la strikta senco, malakordas kun la spirito de Artikolo 9 de la japana “Paca Konstitucio” proklamita post la dua mondmilito.

La Ĉambro de Deputitoj en Japanio aprobis la leĝproponon frue en aŭgusto, kaj la Ĉambro de Konsilantoj laŭŝajne aprobos ĝin oficiale en la 27a de septembro.

Manifestacio kontraŭ la leĝpropono pri nacia sekureco. Afiŝoj legiĝas “Ni ne permesos al vi militi” kaj “Abe ekŝigu.” La oficiala kanalo de FNN en Jutubo. [La filmeto jam ne videblas. Ĉi tiu kanalo ĉesis elsendi ordinarajn novaĵojn en la fino de aŭgusto.]

Organizantoj afiŝis la kunvenon kiel la plej grandan manifestacion kontraŭ la leĝpropono, kaj [laŭtakse 120 000 protestantoj](#) plenigis la stratojn antaŭ la japana parlamentejo en la centro de Tokio.

Tviteraĵo de japana ĵurnalisto [Ryuji Morita](#) [Rjuĵi Morita] kaptis la scenon:

Speciala fotoraporto de la ĵurnalo Mainichi [Mainiĉi]:
Homoj ĉirkaŭas la japanan parlamentejon kriante “kontraŭ la leĝpropono pri

nacia sekureco!”

【Filmeto】 Nephre spektu ankaŭ la scenon filmitan de sur helikoptero!

SEALDs (Students Emergency Action for Liberal Democracy -s) [Studenta Urĝ-Agado por Libero kaj Demokratio -j] ankaŭ afiŝis bildojn de la protestado, taksante la nombron de la ĉeestantoj je 350 000:

Ĉirkaŭ 350 000 homoj partoprenis en la protestado hodiaŭ! Mirinde!

[SEALDs](#) estas organizo gvidata de studentoj. Ĝi aperis dum ĉi tiu unu jaro, ĉefe kun la celo kontraŭstari al laŭpercepte dekstraj politikoj de la koalicia registaro gvidata de la ĉefministro Shinzo Abe [Ŝinzo Abe]. Tiuj, kiuj diras ke 350 000 homoj partoprenis en la manifestacio, verŝajne kalkulas ankaŭ homojn, kiuj partoprenis en aliaj manifestacioj tra la tuta Japanio, ĉiuj organizitaj samtage en la 30a de aŭgusto.

30 000 homoj protestis en Osaka.

Eĉ en la fora provinca urbo Tokushima [Tokuŝima] protestantoj manifestaciis:

Mi renkontis manifestacion en Tokushima! Mi havas tempon antaŭ la laboro, do, mi partoprenu!

Estas malfacile kalkuli la manifestaciojn tutlande okazintajn, ĉar ili ne estis protestadoj nur de junuloj marŝantaj en japanaj urboj:

Ĉi tiu foto larmigas min.

Ĝenerale, protestantoj diras, ke ili kontraŭas la provon aboli aŭ ĉirkaŭiri Artikolon 9 de la Konstitucio de Japanio, kiu klare malpermesas al Japanio militi.

Por eviti longedaŭran proceduron por konstitucia revizio, kiu influus la rezulton de la venontjara elektado de la Ĉambro de Konsilantoj, la koalicia registaro provis “redifini” militan deplojon per esprimoj iel akordigeblaj kun la Paca Konstitucio de Japanio.

[Artikolo 9 de la Konstitucio de Japanio](#) malpermesas militon kiel rimedon por solvi internaciajn konfliktojn, tamen la japana registaro sub Shinzo Abe diras, ke la lando devas havi la kapablon partopreni en militaj agadoj kun ĉefaj aliancanoj, precipe Usono.

Praktike, kolektiva memdefendo probable signifus, ke Japanio povas plenumi senminigajn operaciojn, deploji siajn Egid-krozoŝipojn por aerdefendo kaj eskorti cisternajn ŝipojn. Kaj estas ankaŭ la ebleco, ke Usono kaj Japanio kunlaboros por gardi teritorion pretendatan de Japanio en la plej okcidenta regiono de la insularo, precipe Senkaku-Insuloj [Diaoyu-Insuloj laŭ Ĉinio, Tiaoyutai laŭ Tajvano], kiujn pretendas ankaŭ Ĉinio kaj Tajvano.

Solidareco

Neniam emeritiĝu for de la vivo

Omaĝe al ĉiuj maljunaj Gefratoj, mi prezentas al vi pecojn el mia ĉefartikolo el la 24-a eldono de “Revuo de LBV” (Jan. /Febr. 1992), publikigita antaŭe, en la jardeko post 1980, fare de la ĵurnalo “Folha de S. Paulo”.

Ni vivas en tempo de konstanta materia progreso. Tamen, oni ne vidas la respondan antaŭeniron en la kampo de etiko kaj de Spirito. El tio rezultas malbonoj kiel malsato, perforto kaj malrespekto al la Naturo. Kaj bedaŭrinde homoj en la tria aĝo estas ankaŭ trafataj de malvarmaj homaj sentoj.

Estas vera krimo ne rekoni la valoron de maljunaj Gefratoj. En ĉi tiu vivofazo, pli ol iam, ili meritas karesojn kaj solidarecon flanke de la pli junaj, je justa rekono pri la kontribuo, kiun ili transdonis al la socio.

En LBV ni ne konsideras maljunecon kiel sinonimon de io kadukiĝinta. Neniu homo estas maljuna, kiam li havas bonan, grandan Idealon. Li jam ne povas porti pianon, ne plu promeni sur motorciklo. Tamen, se li havas entuziasmon en si, tiam li estas juna. En certa momento de la vivo, homoj bezonas, malgraŭ sporadaj esceptoj, emeritiĝi for de siaj dungpostenoj, sed ne devas fari tion rilate al la vivo. Ili devas batali, se ili ankoraŭ povas spiri.

Legio de Bona Volo funkciigas, per sia ampleksa laboro por subteno de la homo kaj de la socio, Hejmojn por apogado al maljunuletoj, kaj sanajn lokojn por kunvivado. Tie, avoĉoj kaj avinjoj estas prizorgataj kun multe da Amo, kaj precipe lernas, ke neniam estas tro malfrue por kunlabori per siaj spertoj, favore al ia pli feliĉa Homaro, ĉar la forto de bonaj ekzemploj inspiras novajn generaciojn venki barojn en la surtera vivo. (...)

Eble tio ŝajnas paradokso. Tamen, lando kiu forlasas siajn maljunulojn ne kredas pri la estonteco de siaj junuloj. Kio estas nacio, se ne ties elementoj? Se ekzistas estonteco, tiam la junaj maljuniĝos. Ili vivos pli longe. Sed ankaŭ tiuj emeritiĝos... Iam firma konvinkiteco pri tuja vivĝuado estas elmonro pri nekredo pri la estonta tempo. Kaj ekzistas homoj, kiuj estas ankoraŭ junaj kaj pensas: "Ni vivu nun, ĉar eble baldaŭ ĉio finiĝos! Kaj damniĝu tiuj, kiuj

sukcesis longe rezisti... ” Ni ĉi tie neniel troigas. Tion oni ja vidas, ankaŭ. Oni havas la impreson, ke kelkaj el tiaj homoj, kiuj ĝuas la viglecon de juna aĝo spitas la eblecon, ke ankaŭ ili atingos la kadukiĝon. Sed eble ili alvenos tie... Ne eblas estonteco sen gejunuloj. Ankaŭ ne sen maljunuloj.

Ni devas kunigi la spertotrezoron de pli maljunaj al la fruktodona energio de pli junaj. (...)

Ni batalas por ia mondo, kiu donu ŝancojn al ĉiuj. Kaj estas ebla. Neeble estas daŭrigi tiel, kiel nuntempe: la terura sceno de animoj sekiĝintaj pro indiferenteco al la Amo de Dio, kiel la sekaj ostoj en la vizio de la profeto Ezekielo. Nia mondo devas akcepti la spiritan blovon de la Vivo, ĉar ĝi estas riĉa kaj tre vasta, kaj havas sufiĉe da spaco por ĉiuj. (...)

José de Paiva Netto estas verkisto, ĵurnalisto, radikronikisto, komponisto kaj poeto. Li estas direktoro-prezidanto de Legio de Bona Volo (LBV), efektiva membro de Brazila Asocio de Amaskomunikiloj (ABI) kaj de Brazila Asocio de Internaciaj Amaskomunikiloj (ABI-Inter). Li estas membro de Nacia Federacio de Ĵurnalistoj (Fenaj), de International Federation of Journalists (IFJ), de Sindikato de Profesiaj Ĵurnalistoj de Ŝtato Rio de Janeiro, de Sindikato de Verkistoj de Rio de Janeiro, de Sindikato de Radikomunikantoj de Rio de Janeiro kaj de Brazila Unuiĝo de Komponistoj (UBC). Li partoprenas ankaŭ Akademion de Beletro de Centra Brazilo. Li estas aŭtoro por internacia referenco pri konceptado kaj defendado de Ekumenaj Civitaneco kaj Spiriteco, kiuj laŭ li estas *"lulilo de plej grandanimaj valoroj, kiuj naskiĝas en la Animo, nome en la loĝejo de emocioj kaj de rezonkapablo prilumita de intuicio, medio, kiu enhavas ĉion, kio transcendas la vulgaran kampon de materio kaj devenas de la homa sublimita sentemo, kiel ekzemple Vero, Justeco, Kompatemo, Etiko,*

La situacio en Hungario rilate la krizon de rifuĝintoj

El la vidpunkto de la homaj rajtoj en **Hungario** evoluas aparte malfavoraj kontraŭhomaj tendencoj. Dum la diskriminacio kaj stigmatizado de romaoj (ciganoj) havas longan tradicion en tiu lando, la aktuala Orbán-reĝimo ĵetis aldonan oleon en la fajron; ĝi ne nur subpremas la rajton libere esprimi alian opinion sed ankaŭ per ĉiuj manieroj kaj rimedoj malhelpas la aktivecon de la opozicia civilsocio, kiun oni krude ĉikanas laŭ (belo)rusa maniero. En Hungario ekzistas leĝo, kiu lezas la religian liberecon kaj ĉikanas ekleziojn. La hungaraj aŭtoritatoj mistraktis


ankaŭ rifuĝintojn kaj azilpetantojn, kiujn oni ofte sendas en la malliberejon. Precipe ĉe la limo kun Serbio la hungaraj aŭtoritatoj resendis multajn rifuĝintojn al Serbio. En 2015 Hungario komencis konstrui dratbarilon ĉe sia landlimo kun Serbio[1] kaj anoncis, ke oni ne plu pretas repreni rifuĝintojn, kiuj forlasis Hungarion en la direkto de tria lando. Do, la homrajtaj instancoj de UN kaj EU havis multajn kialojn por plendi pri la sufiĉe malfacila situacio de la homaj rajtoj en Hungario, kiu riskas fariĝi paria ŝtato laŭ faŝismaj tendencoj, kiu ne hezitas serĉi la kontakton kun Putin, kiam ĝi sentas sin „diskriminaciata“ de Bruselo.

En la krizo de aŭgusto/septembro 1915, kiam miloj da rifuĝintoj el Sirio kaj aliaj landoj sovaĝe atingis la eŭropajn landojn, Hungario kaj aliaj orienteŭropaj landoj montris nulan solidarecon sed nur neelteneblan arogant-econ, krude traktante la homamason en maniero, kiu parte rememorigis tempojn de la nacisocialismo kaj komunismo.

Beletraĵoj

Mimoza Ahmeti

Elektitaj Poezioj



Partopreno

Kontempli min,

Animskui min...

Imagebla la ĉeesto de animskuo

Pro kelkiu, eĉ pro iu atendo...

Sed ne okazas. Ne plu okazas

Ekde kiam ĉio far mi estiĝis.

Ekde ĉio far la aliuloj estiĝis

Kvankam suferis, la spirito ebriiĝis

Dum atendo, soleco kaj ekzalteco.

Estis figuro, tento, prilumigo..

Sed ne plu okazas. Ne plu okazas

Ekde kiam far mi ĉio estiĝis.

Fertila cerbo

Ĉiuflanka vaneco.

Klopodas mi trafendi per animo

Ĉi tiun staton intertempe...

En muteca kampo mi mem retenas..

Ĉu rekonsciiĝos miaj amikoj,

Ĉu estos iom da rideto en iliaj vizaĝoj,

Peka senkulpeco dum vira vekigo,

Ĉu estos plu amo kaj amantoj?

Ĉiuspecaj revelacioj,

Venenoj

Kiujn mi devas forvali per la kreda espero...

Kie sin apogas la kredo, kie mi apogas min?

Ĉu povas sin apogi ĉe Dio

Iu neperfektulo?

Sed eble la polvo kaj la forgeso

Ne elĉerpiĝos en la amikaj vizaĝoj.

Kaj poste,

Kian sencon havas ĉi tiu soleca mia rezisto

En ĉi tiu muteca kampo,

Sed ankaŭ la kapitulacio en la kolektiva kapitulacio

Ne lasas min esperi je iu bono,

Knediĝis mi je plej libera maniero...

la libero estas aro de obstakloj

Per kiuj konstruiĝas la spaco

Kaj la memo estas Dio

Kiun ni tenas en la ĉielo

Ĉar surtere ne povas vivi....

Stranga cerbo. Fekunda.

Ĉu estas enmonde amo kaj amantoj?

La imitanto

Rememoros mi sopire

La homon kiu ŝajnis min ami:

Estis li mirinda imitanto de la sento

Kun mirakla brilo en la okuloj,

Povas mi diri ke ni flugis tra la ĉieloj

Kaj ne revenis

Kiam ambaŭ ĉirkaŭ la tablo eksidis...

Kio do instigis lin klopodegi

Ĝis la naturaj radikoj

Kaj demandi per imitado

Al la amo, la spegulaĵon?

Mi ne pentis ke kun li jam flugis

Kaj deziras ekflugi en vakuo

Ĉar la sekreton de la sentoj
Neniu en ĉi tiu mondo ja scias.

Neniu povas diri kie estas la radikoj
De la doloroj kaj amoj.
La homoj estas povraj pretekstoj
En la fluoj de la larmoj, feliĉoj.

Kaj ne pentis mi ke kun li flugis
En vakuo...

Mi eta spiritulino

Mia eta spiritulino,
Danke al la kisoj de via patrino
Eksciu, ke senhalta soleco
Malfermos vian vojon,
Soleco ja estas ĉiu vojo,
Soleco, ĉiu homo.

Mia spiritulino, pretiĝu:
Almenaŭ unufoje en la vivo
Kolektiva frenezeco
Ekfrapos vian revon
Kaj neniu volas scii

De kie venis tio.

Poste paca akordo

Kolektiva

Kiu denove apenaŭ ekspliceblas-

Estas kvazaŭ eksplici la venton-

Ĉion forviŝos.

Kaj denove vi, eta spiritulino

Foriros soleca:

Estos multaj revoj

Similantaj al la vizaĝoj,

Al la manoj,

Kaj freŝigantaj la vizaĝon

Vian kaj la manojn:

Sed tio estos kiel la akvo-

Nur fluas. Ne haltas.

Por ke estu pli klara al vi

Mia spiritulino, ne forgesu

La homoj similas al la muŝoj

Kiuj sur la kora kuko malpurigas.

Kaj la plej bona el ili

Unufoje vin malplezurigas...

Mi forte kisas vin

Mia eta spiritulino

Ĉat tiel estas..

La atento al la memo

Vi, kreitaĵo

Kun multspecaj elementoj je alportaĵoj

Preterante,

Haltu iom kun si

Por eksenti la econ de la haroj

Kaj la amon de la krono

Ĉirkaŭ la vizaĝo.

Vidu vian verdan rigardon

Kiu magnetigas la suferojn

Kaj forgesigas la perdojn

Aŭskultu iom tiujn voĉojn

Kiujn neniŭ diris vin, tiuj

Sorĉitaĵoj venantaj el internoj kaj

Se vi plu aŭskultos

La ĉambro plenplenos je sonoj

Kaj, se vi esktere troviĝas

Al la suno ekrilatas

Kaj se estus nokto

Monda nostalgio

La steloj origas

Por vi,

Nur aŭskultu

Viajn internojn

Kaj neniu povas subigi vin...

Nek tristeco.

Estos tiel dum la tuta tempo

Kiam vi aŭdos vian reagon,

Mi petas,

Ne reagu sen aŭskultante

Anticipe

Vian reagon,

Ne amu sen antaŭami

Vian senton,

Kaj ne malamu, faru plejeblon

Ne malamu

Se vi volas ke la prudento

Ĉirkaŭpreni vin de ĉiuj flankoj

Per floroj.

Komprenu, esence

Estas la sentemeco tio, kiu

Igas nin memestaj,

Kiel la soifo kiu donas guston kaj

Koloron al la akvo

lom da atento al la memo

Povas doni vin

Plenan Paradizon

Meze de la Infero.

Elzbieta (Pollando)



Mi iras butikumi
Anstataŭ retumi
Mi devas manĝi
Menuon ŝangi

Mi eniras la vendejon
Kiu nomiĝas viandejo

Mi devas elekti ; kokaĵon
Porkaĵon
Bovaĵon
Fiŝaĵon?

Mi ne ŝatas manĝi bestojn
Eble sen ĝi estas festoj

Ni provu la legomojn
fruktojn, panon,
kelkajn ovojn

La kukumo
kaj tomato
Kune faras la salaton

La ĉerizo
kaj banano
Iras bone kun kaŝtano

lomete da brokoloj
plaĉas al maljunaj Poloj
Kaj tio bongusta persiko
feliĉigas iun de Meksiko
La pomo
kaj la terpomo
Trovegas en ĉiu domo
Via sano kaj humoro
Pliboniĝas dum la horo

(Ĉerpita el Vizaĝlibro)

Sigmond Julia

LETERO DE AŬGUSTO 2015

Karaj Geamikoj!
En ĉi tiu letero mi rakontas pri du ne ĉiutagaj ĝojoj.

KATARAKTO

Mia dolĉa edzo Filippo preskaŭ perfortis min, ke mi faru la okuloperacion ankaŭ je la dekstra okulo. Li diris: por ci la plej gravaj aferoj estas la skribado kaj la legado, pro tio ci bezonas bonajn okulojn. Nun, post la bonrezulta operacio mi estas tre dankema al Bonadio kaj mi dankas al Filippo pro lia „perforta helpo”!

LIBRO DE MIA FRATO

Se mi bone memoras, Goethe diris la jenajn frazojn: *IMAGU KION VI DEZIRAS, DEZIRU KION VI IMAGAS, EFEKTIVIGU KION VI DEZIRAS*. Dum mia tuta vivo tre ofte mi pripensis ĉi tiujn frazojn. Ankaŭ koncerne de la libro de mia frato. Sed jen la historio de la libro.

En novembro 2013 aperis la 19a volumo de mia frato István Sigmond, kun la titolo: *KONSILO DE ATEISTO: KREDU JE DIO*. En januaro 2014 li mortis. Mi decidis eldoni la libron en ESPERANTO. Kun la helpo de dudek hungaraj esperantistoj mi sukcesis traduki la volumon kaj eldoni la libron en 2015. Mi estas treege dankema al ĉiuj, sed precipe al grandanima Jozefo Horváth (Győr, Hungario), kiu ne nur tradukis plurajn novelojn, sed eĉ redaktis la libron. Antaŭkonsentite al ĉiuj tradukintoj mi sendis tri ekzemplerojn el la libro. Al la Libroservo de UEA mi sendis dudek ekzemplerojn kaj po unu libro al pli ol okdek esperantistaj geamikoj. La eldono de 200 ekzempleroj kostis miajn tri monatajn pensiojn, mi devis pruntepreni monon de la Reciproka Helpkaso por Pensiuloj, kiun sumon mi repagos dum dek monatoj. Tre feliĉa mi estas, ke mi sukcesis efektiviĝi mian deziron kaj mi sukcesis eldoni la libron de mia frato. Vera sukceso! Memore al mia frato István nenion pli belan mi povas imagi!

VARMEGO

Dum mia tuta vivo mi ne travivis simile varmegan someron. Pacience mi atendas la finon de tiu varmeĝo, sciante, ke nenio estas eterna en ĉi tiu tera mondo.

ABITURIENTA RENKONTIĜO

Ho, ve! Preskaŭ mi forgesis skribi pri la tria ĝojo! Kvankam ĝi ne estis tute perfekta. Temas pri la 66a renkontiĝo post la abiturienta ekzameno. El okdekunu ekskoleginoj ĉeestis nur sep knabinoj. Fakte la malĉeesto estas motivigita, ja la plimulto de la knabinoj estas 85 jaraĝaj. Eĉ en Kluĵo loĝantaj koleginoj ne ĉiuj alvenis. En la aliaj urboj aŭ landoj vivantaj eĉ ne plu pensas vojaĝi kaj partopreni. Pasintjare ankoraŭ ĉeestis ĉirkaŭ dudek! Kelkaj aliurbaj telefonis, ke anime ili estas kun ni. Tamen, la ĉeestantaj knabinoj ĝojis vidi unu la alian, vigle babiladis pri la problemoj de la maljuneco kaj faris fotojn. La sincera amo kiu kunligas nin estas belega miraklo! Ni ĉiam esperas, ke ankoraŭ ni vidos unu la alian!

ORGENLUDADO

Eble jam pasis ok jaroj, kiam mi lastfoje ludis je orgeno de mia preĝejo. Kaj nun mi estis petita anstataŭi la kantorinon malsanan. Iom aŭdace, sed mi akceptis la kunlaboron. Mi petis mian baptofilinon Rita, ke ŝi helpu min, precipe en la kantado. Tiel okazis, ke du dimanĉojn mi sukcese orgenludis en la kluĵa centra unitaria preĝejo. Mi dankas al Bonadio ĉi feliĉigan eventon!

MALĜOJOJ

Iu demandis min: ĉu eblas, ke mi neniam havas malĝojojn? Ĉu miaj ĉiuj tagoj ĉiam estas ĝojplenaj? Nu, sincere mi konfesas, ke fojfoje ankaŭ mi tristas. Ekzemple, kiam mi perdas bonegan maljunan amikininon, aŭ ofte pro la senesperiga nuntempa kruela situacio en la tuta mondo. Sed mi lernis kaj humile akceptis, ke **ĈIO ESTAS BONA EN LA TUTO DE LA KREADO**. La forta amo helpas min elteni kaj akcepti la ĉagrenojn de mia vivo. Memkompreneble, multfoje mi ne komprenas: fakte kial okazis io ĝuste kun mi aŭ al mi? Sed post iom da pensado mi scias kaj sentas, ke malgraŭ ĉio: **LA VIVO ESTAS BELA KAJ VIVI KIEL HOMO MERITAS KAJ ESTAS BONE!**

Ĉu la esperantistaro kuraĝas meti la fenomenon de malamikeco al fremduloj ĉe la landlimo en sian tagordon?

Ĉu ĝi entute interesiĝas pri la neceso ekkomuniki translime, ne nur la politikistoj, sed la esperantistoj mem, ĉar nun dividitaj en apartaj landaj asocioj, pasive.

Ni estas movado por lingvaj rajtoj, diras la Manifesto de Prago. Derks diras: Ni estas ankaŭ movado por homaj rajtoj, por helpi establi "internacian protektadon" (art. 14 de la Homaj Rajtoj).

Sen Rodin reagas:

De longe via demando turmentas min kaj mian edzinon. Ĉiutage ni spektas tragedion: milionoj da homoj fuĝas de siaj landoj trafataj de kruelaj plagoj - militoj, masakroj, dezertiĝo, malsato, soifo, malsanoj - kaj petas helpon kaj rifuĝejon al ni, loĝantoj de la plej riĉa kontinento de la planedo. Temas pri amasa migrado simila al tiuj, pri kiuj parolas la "sanktaj libroj" de pluraj religioj. Kaj ni, kleraj civilizitaj eŭropanoj, kion ni faras?

Ni konstruas murojn, mobilizas niajn policojn-armeojn-militŝiparojn por bari al ili la vojon, repuŝi ilin, igi ilin droni milope en Mediteraneo aŭ sufokiĝi en kamionoj; aŭ ni perforte resendas ilin, ligitajn kiel bestoj, al iliaj devenlandoj, kie atendas ilin certa morto; aŭ, en plej milda okazo, ni fermas ilin en koncentrejojn kaj igas ilin vivi en subhomaj kondiĉoj dum monatoj kaj jaroj.

Tia situacio vekas ja la protestojn de et-eta minoritato, sed samtempe ekscitas la sovaĝan instinktan egoismon de rasismaj, ksenofobaj, faŝismaj, novnaciismaj movadoj. Kiel ĉiam okazas en similaj cirkonstancoj, ili serĉas la "propekan kapron": en la 30aj jaroj la hebreojn, hodiaŭ la migrantojn.

Julia Sigmond

2015 SEPTEMBRA LETERO

Karaj Geamikoj!

4. SEPTEMBRO

Nomtago de Rozalia. Mi ne scias parkere ĉiujn nomtagojn, sed ĉi tiun certe mi neniam forgesas.

Mia edzosinjoro certe dirus: hazardo! Ĉiuokaze estas interesa "hazardo", ke ambaŭ miaj avinoj

nomiĝas Rozalia kaj eĉ mia baptopatrino! La patra avino nomiĝas Tòth Rozàlia, la patrino avino

Csèp (ĉep) Rozàlia, la baptopatrino Sigmond Rozàlia, sed ĉiuj diris al ŝi Ròzsika (roĵika) aŭ

Fraŭlino. Nome, ŝia fianĉo mortis dum la unua mondmilito kaj ŝi vivis kiel vidviniĝinta fianĉino ĝis

la morto! Bonadio vivigu ĉiujn virinojn kun la nomo Ròza, Rozalia, Ròzsika aŭ Rozàlka!

7. SEPTEMBRO

Post sep semajna foresto, antaŭ semajno mi revenis al Italio. Pro la bonsukcesa okulooperacio

(katarakto) preskaŭ pli multe ĝojas Filippo ol mi mem! Kaj danke al skype nun pli facile li eltenis la

“orfa-hundo”- vivon, ĉar ni povis vidi ĉiutage unu la alian, ne nur skribi la ĉiutagan leteron.

9. SEPTEMBRO

Ses jaroj pasis ekde nia geedziĝo (09. 09. 2009.). Bele ni pridiskutis la okazintaĵon kaj ni rigardis

malnovajn fotoalbumojn. Ni ambaŭ estas dankemaj unu al la alia, ĉar ni provas plibeligi la lastajn

jarojn de nia vivo por la alia. Kvankam la oldiĝo malhelpas la vivon. Sed la fakto, ke ne sola ni

devas elteni la malfacilaĵojn, esence eltenebligas la aferojn!

LA LIBRO DE MIA FRATO

La postoperacia deviga multega ripozo donis la eblecon por iu facila laboro, nome enpakigi kaj

enpoŝtigi la libron de mia frato, tradukita al Esperanto, *Konsilo de ateisto: kedu je Dio*, kun la

helpo de mia baptofilino, Rita. Nemezureble granda estas mia ĝojo. Unue, ĉar mi sukcesis plenumi

mian promeson, nome sendi al la dudek tradukintoj po tri libroj, due, ĉar krome mi sukcesis sendi al

pli ol cent esperantistaj geamikoj la libron. Kiel oni diras en Italio, tio jam estas ĉerizo sur la torto,

ke super ĉio, du Libroservoj mendis el la libro 25 ekzemplerojn kaj mi tuj sendis al ili ankaŭ la

menditajn librojn.

FINO DE SEPTEMBRO

Kvankam nun estas nur la mezo de la monato, kiam mi skribas ĉi leteron, tamen, sufiĉas por mi nur

ekaŭdi la vorton **septembro**, jam reflekse tuj mi komencas skandi en mi unu el la plej belaj poemoj.

Aleksandro Pefoĥi:

Fino de septembro

Jen floras ankoraŭ la kampo de valo,
kaj verdas ankoraŭ la poplo ĉe font',
sed jam tie, vidu, sub vintra vualo,
sub neĝo kaŝiĝas la supro de mont'.

Jen en mia koro sub flama radio
de l' suno paradas printempo de jun',
sed griza jam iĝis ĉe mia tempio
la nigra hararo : ĝin prujnis aŭtun'.

La floro defalas, la viv' de ni kuras...
Ho, al mia sino, edzin', mia am'!
Ĉu eble vi, kiun nun bruste mi lulas,
vin morgaŭ ne ĵetos al tomb' mia jam?
Ho diru, se morto min antaŭ vi prenos,
ĉu min do vi gardos en larva memor',
aŭ am' de junulo vin foje katenos,
ke ĵetu vi nomon mian de vi for?

Se l' vidvovualon de frunt' vi deŝiros,
pendigu ĝin al mi sur tomba kolon'
je flago tenebra. Mi por ĝi eliros
noktmeze, ĝin porti al mortregion,

por viŝ', de vizaĝo humilda de ploro
pri via facile forgesa anim',
por vindo de vundo dolora de koro
eĉ tiam amanta, eĉ tie, sen lim'.

Tradukis Kolomano Kalocsay

ĜOJO DE ĜOJKOLEKTANTO

estus, se mi sukcesus kolekti la ĝojojn de miaj karaj leterlegantoj. Pro tio mi petas vin ĉiujn,

bonvolu skribi al mi, kio estis via plej granda ĝojo en ĉi tiu malfacila 2015^a jaro! Mia frato,
Iŝtvàn,

verkis libron antaŭ jaroj, kies titolo estis *Plendoj de iu plendokolektanto*. Ĉi tiu titolo donis al
mi la

ideon, ke mi provu ŝanĝi ĉi tiun malfacile elteneblan, plendojn kaj ĉagrenojn enhavantan vivon,
ke

ni ĉiuj provu pensi ankaŭ pri ĝojoj! Ni helpu unu la alian almenaŭ per tio, ke ni donos eblecon al

aliuloj ĝoji por alies ĝojo! Mi tre atendas ankaŭ vian ĝojon!

RIFUĜINTOJ

Frakasa sento estas la senpovo.

Oni legas kaj aŭdas pri la malfeliĉaj kaj mizeraj rifuĝintoj, pri ilia terura kaj senespera sorto, kiuj en

siaj propraj hejmolandoj ne trovas viveblecon kaj riskante ĉion, ili serĉas alian, novan vivon. Ne

ĉiuj kompatas ilin. Multaj homoj indiferece sciiĝas, ke denove dronis barko, sur kiu troviĝis

patrinoj kun siaj infanoj kaj ili finis la vivon amaran, senĝojan, dronante en maron. Oni montras

ankaŭ aliajn fotojn pri junuloj sanaj kaj fortaj, kaj oni volas kredigi, ke fakte ili ne estas rifuĝintoj,

sed de Usono varbitaj dungsoldatoj, per kiuj Usono volas invadi Eŭropon. La Papo petas ĉiujn helpi

la migrantojn. Aliuloj faras ĉion eblan, ke la mizeruloj el Afriko aŭ Azio, kiuj volas savi sian vivon,

neniel povu enmigri la riĉan Eŭropon.

Mi, maljuniĝinte, jam nur preĝi povas.

Laŭ miaj kapabloj mi helpas tiujn, kiujn mi povas. Ekzemple, mi aŭskultas pacience la plendojn de

tiuj maljunulinoj, kiuj vivas solaj kaj eĉ malsanaj kaj malriĉaj estas.

En mia ĉiutaga preĝo mi petas la Bonadion, helpu min, ke mi ne penadu pri la konsolo, sed mi

provu konsoli, ke mi ne pretendu komprenon, sed mi provu kompreni la aliulojn, ke mi ne volu, ke

oni amu min, sed mi amu ĉiujn.

Kun senfina amo mi ĉirkaŭbrakumas vin ĉiujn!

Jùlia

•